

BULGARA

ESPERANTISTO



11-1980

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





E-kurso por komencantoj en u. Stanke Dimitrov.
Gvidanto Girginov, instruisto.

Redakta komitato:

Kunco VÁLEV (ĉefredaktoro), Vasil BCRVANSKI,
Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro
HAĜIEV, Krástju KARUCIN, Haim LEVI (vicĉef-
redaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodí Garev

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66 Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919.
Eldonkvanto 6100.

ENHAVO

• • • Niaj antaŭstarantaj taskoj.	1
• • • Tria internacia renkontiĝo de verki- stoj	2
N. Hristozov, R. Kabaivanska, L. Mileva. La paco kaj la arto (voĉoj de bulgaraj kultur- agantoj)	3
Boris Hubenov. La minaco	4
• • • Honoritaj Esperanto-lektoroj	4
Arina. Vivo, dediĉita al Esperanto (90 jaroj ekde la naskiĝo de Ivan Krestanov)	5
Prof. Kiril Popov. La medicinistoj antaŭ gravaj taskoj	6
Coco Kolarov. En klubo de la esperantisto	6
P. A. La E-societo en Pazargik 70-jara	7
Stojko Cankov. Sukcese komenciĝis la nova lernojaro	7
Dimitro Marev. Plibonigita materiala bazo Dimitro Jdrakov. Velingrad — ŝatata bazo de Esperanto	8
K. K. Kaŝtana vespero en Petriĉ	8
Cvjaŭko Todorov. Celebro de Dimitro Penĉev Kiril Kalĉev. Vigla somera E-agado en Loveĉ	9
• • • Konkurso pri verkado de lernolibroj Dimitro Ivanov. Vigla esperantista ŝakagado en Targoviŝte	10
Boris Gorniŝki. Eksterlandaj gastoj en Kneja Hristo Smirniŝki. Soveta Rusio. Traduko de S. M. Simeonov	11
A. P. Ĉehov. Li trosalis	11
• • • Esperanto en la praktiko (valora libro pri Bulgario)	12
Rajna Konstantinova. La blanka rozo	13
• • • Rezolucio de la 65a UK de Espe- ranto	14
Michael Lenariz. Kelkaj informoj pri la ju- nulara E-movado en GDR	14
• • • De lando al lando	15
Vanko Bårdarov. E-seminario en Berlino	15
D-ro Asnes. Letero al prof. E. Boirac	15
Prof. d-ro Radi Radev. Epoklara verko (1000a datreveno de la naskiĝo de Aviceno)	16
Stefan Sokolov. Lenin-montetoj	III
Adolf Holzhaus. Vorteniĝmo	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Partoprenantoj en la jubilea solenaĵo en Pa-
zargik (vidu paĝon 7)

NIAJ PERANTOJ

Alfabeto laŭ landoj:

Britio. Covenham Louth, Lincs,
Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt

Ĉeĥoslovakio. 040 01 Košice,
Šmerova 35/1, Esperantisto Slovaka,
Daniel Papak

Finnlando. PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,
Finna Esperanto-librejo

Francio. 54042, Nancy Cedex
11 Cours Leopold, s-ro Roger Degrelle
Jarabono: 20 ff

Germana Demokratia Respubliko,
DDR 108 Berlin, Charlotten str. 60,
Cenra Laborrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina
kkfr Iggebach, Schlossgasse 30 D-6731 Elmstein
Jarabono: 8 gmk.

Hispanio, Gijón Asturias, Ramon y Cajal,
44-3º — Izqda, s-ro Adonis Gonzales Meana
Jarabono: 300 ptoj

Hungario. „Budapeŝta informilo“, p. k. 153, H-1443 Bu-
dapest

Italio. 20052 Monza (Milano), c/o Romano Morelli,
via G. Cantore 8, Grupo Esperantista Monzese

Kubo, Habana 1, poŝtkesto 314,
Kuba Esperanto-Asocio

Mongolio, Ulan-Bator, poŝtkesto 733,
Mongola Esperanto-Asocio

Portugalio, Portugala Esperanto-Asocio R. DR. Joao
Couio, 6 R/C. A Lisboa-4
Jarabono: 260 eks.

Sovet-Unio, 200016 Tallinn, Estonio, do vostrebomanja,
Johannes Palu
Jarabono: 5 rubloj

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio



NIAJ ANTAŬSTARANTAJ TASKOJ

En la komenco de novembro en Sofio kunidis la Centra Estraro de BEA. Ĝi prenis decidojn, kiuj estas ellaboritaj surbaze de la rezolucio de nia 40a jubilea kongreso. Tiuj dokumentoj esprimas la volon de nia anaro fari novajn gravajn paŝojn dum la proksimaj unu-du jaroj.

Temas unufoje pri la organiza laboro de nia asocio. Por havi ankoraŭ pli fortikan organizadon kun kreskanta aŭtoritato en la lando kaj ekster ĝi, necesas, ke la funkciuloj de ĉiuj ŝtupoj montru konstantan aktivecon. Tiuj ĉi aktiveco devas esti racia, kio postulas, ke oni skizu laŭ lokaj kondiĉoj unu- aŭ dujaran planon, sur kiu sin apogu la societa agado.

Temas pri efikoplena propagando de la lingvo, kiu altiros al la kursoj novajn adeptojn de nia nobla pacama afero. Iom post iom oni devas zorgeme eduki novajn e-istojn el inter la junularo. Ja nia maljuniganta generacio devas prepari stajn anstataŭantojn. La edukadon oni devas komenci jam en la kursoj, paralele kun la lernado de la lingvo, kaj daŭrigi ĝin per ĉiuj formoj de nia asocia vivo — kunvenoj, amuzvesperoj, celebroy de E-veteranoj kaj aktivuloj, de datrevenoj kaj eventoj, revuoj de la E-parolo kaj kanto, ekskursoj ktp. Aparte granda estas la eduka signifo de la antaŭstarantaj jubileoj: 1300 jaroj de la bulgara ŝtato, 90 jaroj de la fondo de BKP, 100 jaroj de la naskiĝo de la granda popolgvidanto Georgi Dimitrov, 75-jara jubileo de BEA. Por inde celebri tiujn ĉi gravajn

eventojn necesas zorgema kaj sufiĉe frua antaŭpreparo.

Temas pri senĉesa plibonigo de nia instru-laboro — organiza kaj metodika. Jam estas tempo iri al produktaj entreprenoj, sciencaj institutoj kaj aliaj kaj porti tien la lingvon de la internacia amikeco. Tio donos novajn fortojn al nia movado.

Temas pri servo al neesperantistaj organizoj. BEA kontaktis por kunlaborado kun la Patrolanda Fronto, Komsomolo, Legejoj, Nacia Packomitato, Komitato de la Movado de Bulgara Virinoj, la Kooperativa Unuiĝo k. a. Necesas kunlabori sur ĉiuj niveloj kun tiuj sociaj organizoj. Ni estu perantoj inter ili kaj simitaj organizoj en fremdlando. Tiel oni facile kaj rapide konvinkigos pri la praktika utileco de E-o.

Plenumante la sociajn taskojn oni ne forgesu eĉ por momento, ke la sociekonomia konstruado estas la plej grava tasko de nia popolo. Do ĉiuj e-istoj devas labori abnegacie, modele por la sociekonomia supreniro de nia kara patrolando. Ju pli bonstato nia popolo, des pli grandan atenton ĝi donos ankaŭ al la E-movado.

Grava dokumento de la plenkunsido de la Centra Estraro estas ankaŭ la plano de socialisma konkurado. Ĝi koncernas ĉiujn lokajn societojn, sekciojn kaj distriktajn estrarojn. Ĝia efektivigo estas dediĉata al la supremaciitaj jubileoj kaj al la XII kongreso de BKP. Ni, e-istoj, renkontu ĝin per indaj faroj.

VERKEMAJ GEKAMARADOJ!

PARTOPRENU LA LITERATURAN KONKURSON DE «BULGARA ESPERANTISTO»! PROKSIMIĜAS LA LASTA TAGO DE LA FIKSITA LIMTEMPO.

VIDU DETALAJN INFORMOJN PRI LA KONDIĈOJ DE LA KONKURSO EN N-RO 7—8, PAĜO 24.

LIMTEMPO POR SENDI KONKURSAĴOJN: LA 15 DE JANUARO 1981.



TRIA INTERNACIA RENKONTIGO DE VERKISTOJ

29-30 SEPTEMBRO 1980, SOFIO

La paco — espero de la planedo
Мирът — надежда на планетата
Мир — надежда планеты
La paix — espoir de la planète
Peace — the hope of the planet
La pace — speranza del pianeta
Der Frieden — des Planeten Hoffnung

En 1977 j. laŭ iniciato de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj en Sofio okazis la unua renkontigo de verkistoj, en kiu la majstroj de la belarta parolo levis voĉon defende al la monda paco. La devizo de tiu renkontigo estis: „La paco — espero de la planedo“.

Du jarojn poste en Sofio okazis dua renkontigo de verkistoj. Fine de septembro nia ĉefurbo denove estis domstato de granda internacia forumo — la tria renkontigo de verkistoj. Ĝia temo estis: „La verkisto: la reciproka konatiĝo kaj kompreniĝo de la popoloj“.

En la tradicia loko de la renkontiĝoj — la granda halo de parko-hotelo „Moskva“ — kolektiĝis pli ol 150 verkistoj el diversaj landoj. La halo renkontis ilin per „Odo de la ĝojo“. Ĉiu volis nur unu: ke lia voĉo estu aŭdita ĉe ĉiu paralelo kaj meridiano de nia planedo, ĉar ĝi parolas, ke la paco estas la harmonio de nia vivo, kaj la milito — la kaoso, kiu ĝin detruas, ke la milito estas la plej malica malamiko de la homo kaj de ĉio homa. Ni ne havas kiel vivi, krom sur la Tero. Sed ni ja ne volas vivi aliloke. Bela estas nia planedo kaj sur ĝi estas loko por ĉiuj. Nur estu paco kaj amo.

La prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj Ljubomir Levčev salutis la partoprenantojn kaj proponis kiel honoran prezidanton la venezuelan verkiston Migel Otero Silva — laureato de la Internacia Lenin-Premio „Pro Firmigo de la Paco inter la Popoloj“. La propono estis unuanime akceptita. Per mallonga, sed kolorriĉa parolado la eminenta verkisto dankis al la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj pro la varma akcepto kaj gastamo.

Unu post la alia ĉe la tribuno aperadis verkistoj kaj parolis sen pozo kaj aplombo. Ili simple konfesis tion, kion ili pensas pri la paco kaj milito, pri la hodiaŭa kaj morgaŭa tagoj, pri la respondeco de tiuj,

kiuj verkas. El ĉiuj paroladoj ŝprucis decidemo ne permesi, ke la vero de la verkista parolo estu senpova antaŭ la mensogo. Ne estis pesimismo. En ĉies parolado, en ĉies okuloj brilis kredo je la venko de la paco, kuraĝo kontraŭstari la imperiisman minacon per nuklea milito, fideleco al la batalo por konservado de la civilizacio, de la paco, de la vivo.

En la halo sonis preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo, sed la lingvo de la vero dominis super ĉio. Ĝiaj „a, b, c“ kunfandigis en unu nura vorto — paco!

Estis traŭgigitaj multaj salutmesaĝoj.

Migel Otero Silva proponis tekston de deklaro subtene al la popolo de Salvadoro, kiu batalas por libero kaj socia justeco. La deklaro estis unuanime aprobita.

Fine estis akceptita mesaĝo al la kreantoj en la estonto.

En la paŭzoj mi sukcesis fari kelkajn malgrandajn intervjuetojn kun eksterlandaj gastoj. Mia konstanta demando estis: „Kial vi estas ĉi tie?“ Jen kelkaj respondoj:

JURIJ BONDARČUK (Sovetunio): Car mi amas la pacon kaj la popolojn, ĉar mi amas Bulgarijon. Pri via lando mi povas diri multajn epitetojn, kaj la epiteto estas la reĝo de la prozo. Bulgario estas sunorika, varma, bona, bluciela, talenta, gastama lando kun mirinda estonteco.

ALFREDO VAZELA (Argentino): Kiam mi estas sur bulgara tero, mi havas la senton, ke ia forto min faras pli juna kaj vivkapabla.

ĜEJMS OLDRIĜ (Britlando): Mi devas esti ĉi tie. Alian vojon mi ne havas. Ni devas esti kune kaj unuanimaj.

MARIA NETO (Angola): Tiaj renkontiĝoj unuigas nin. Se ni ne konas unu la alian, ni malfacile povus interkompreniĝi.

En Sofion venis amikoj ankaŭ el multaj kapitalismaj landoj. Ili vidas la bulgaran socialisman realaĵon kaj mem konvinkigis, kiel vanaj, mizeraj kaj sen ia ajn valoro estas la provoj de la burĝa propagando kalumnii la socialisman sociordon.

Ivan Balabanov

DE LA VERKISTOJ PARTOPRENINTAJ EN LA TRIA INTERNACIA RENKONTIGO DE VERKISTOJ EN SOFIO AL LA KREANTOJ EN LA ESTONTO

MESAĜO

Karaj amikoj, kreantoj el la generacioj!

Ni adresas nin al vi, ĉar ni kredas je tiu tempo, en kiu ĉiu homo vivos kaj libere manifestos sin kiel kreanto. Akceptu nian mesaĝon — la voĉon de verkistoj el la tuta mondo, kolektiĝintaj en Tria Internacia Verkista Renkontigo en Sofio sub la devizo „La paco — espero de la planedo“. Nun la paco kaj la espero estas ĉie minacataj de teruraj atomaj, kemiaj kaj bakteriologiaj armiloj, en kelkaj zonoj de la planedo la paco kaj la espero estas jam vunditaj de lokaj militoj kaj de terorismo. En tiu ĉi historia momento, kiam super la mondo pendas serioza minaco de recidivo de nova milito, de uzo de nekonscia ĝis nun laŭ sia forto nuklea armilo, ni levas la voĉon ne nur kaj ne simple por defendo de la homaro, sed ankaŭ por defendo de la plej sankta rajto — la rajto pri ĉiufanka kaj harmonia disvolvigo de la homa personeco.

Ni levas la voĉon kontraŭ la perforta kaj obskurantisma edukado de la juna generacio, ne permesanta manifesti la kreaĵkapablojn, per kiuj estas dolita ĉiu individuo. Ni estas kontraŭ la unufanka edukado, kies nura celo estas transformi la homon en senindividuecan elementon de la ekonomia mekanismo en konsumista socio, ni estas kontraŭ la absolutigo de la tekniko damage al la humanaj sciencoj kaj la spirita kulturo. Ni estas kontraŭ la degeneriga fizika disvolvigo, kiu ĉe la profesia sporto kondukas al dangejoj, difektantaj la homon rezultoj. Nur la ĉiufanka kaj harmonia disvolvigo de la personeco povas certigi la konstruon de harmonia socio, socio de sociala justeco, kiu gvidos sin laŭ la leĝoj de la kreado kaj beleco. Ni estas certaj pri la estonto de tiu socio. Nia historia optimismo — tio estas nia mesaĝo, adresita al vi, karaj posteuloj.

LA PACO KAJ LA ARTO

NIKOLAJ ĤRISTOZOV, merita aganto de la arto kaj
kulturo, unua vicprezidanto de la Asocio de Bulgaraj
Verkistoj:

Estas konate, ke la belarta verko influas grandegan aŭditorion. La libro havas milojn da legantoj, kiuj nevidate ekstaras vice kun la verkisto sur la pozicio de aktiva humanismo kaj kredo en la homa esenco. Tamen venas ankaŭ tiaj momentoj en la sorto de la popoloj kaj de la tuta homaro, en la intima sorto de la verkisto, kiam la arto sugesto ne sufiĉas, kiam la tempo mem postulas de la kreanto gestojn de socia karaktero, kiam lia voĉo eksonas ekster la pago de liaj libroj — kiel alvoko, kiel krio, kiel maltrankvila meditado.

Ni memorigu la jarojn de la antaŭvespero de la Dua Mondmilito, kiam la internaciaj renkontigoj de verkistoj en Parizo kaj Madrido fariĝis monda tribunalo. Feliĉe por la bulgara literaturo ankaŭ niaj elstaraj verkistoj aŭtoritate partoprenis tiujn renkontigojn. La eminenta kreanto kaj sociaktivulo Ljudmil Stojanov estis inter impona grupo da mondkonataj aŭtoroj, kiuj en tiuj maltrankvilaj jaroj reprezentis la maldorman konsciencon de la homaro. Por honoro de la bulgara literaturo kaj de socialisma Bulgario ekde kelkaj jaroj Sofio estas ĉefurbo de mondaj renkontigoj de verkistoj — en 1977 kaj 1979 — sub la devizo „La paco — espero de la planedo“. Nun en Sofio okazas

ankaŭ tria renkontigo internacia de verkistoj.

Jen pro kio ne povas esti iu ajn dubo, ke la bulgara kreantoj de l'arta vorto laŭ konscienco kaj devo arde salutas la ideon pri kunvoko de monda forumo por defendo de la paco, kies gastiganto nia lando havas grandan honoron esti.

Monda Parlamento de la Popoloj por Paco — tio estas vortoj plenplenaj de alta alvoka senco kaj enhavo. Ili sonas kiel potenca voĉo de la prudento, de la kategoria volo de la popoloj super la maltrankviliga komplikeco de la nuntempa mondo.

Nia historio, la tragikaj eventoj, kiuj fosis profundan sulkon en la konscienco kaj en la koro de la popolo, la fiera decidemo de la bulgaraj intelektuloj antaŭ la blinda lavango de la faŝismo konservi sian homan dignon kaj la dignon de sia popolo — ĉio ĉi estas kolosa kapitalo, multvalora kontribuo al la komuna batalo por firmigo de la plej altaj idealoj de la homaro. Tiu ĉi kontribuo ne apartenas nur al la pasinteco, ĝi havas tute nuntempajn valorojn, konservitan kaj pliriĉigitan de la hodiaŭa aktiva pozicio de nia popolo kaj de ĝiaj kreantoj defende alla paco kaj la estonteco de la homaro.

RAJNA KABAIVANSKA, popola opera artistino:

Kiel bulgarino, mi estas fiera, ke la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco okazas en mia lando. Dum tiuj tagoj, plenplenaj de granda streĉo en ĉiuj sferoj de la socia kaj ekonomia vivo, la arto estas espero kaj fido. Granda estas la rolo de la artkreato en la nuntempa mondo.

La vera arto estas egale komprenebla por la diversaj nacioj. Kaj nun, kiam la mondo travivas unu el la plej grandaj postmilitaj krizoj, ni, ĝiaj agantoj, devas

doni ĉiujn fortojn por unuigo de la popoloj. La reveno de l'homoj al la opera arto, al la antaŭklasika, klasika kaj romantika muziko parolas pri ilia strebo al trankvilo en nia streĉa tempo. Revo de ĉiuj kreantoj estas per sia arto porti ĝojon al la homoj, batali por justeco kaj defendi la idealojn kaj la strebojn de ĉiuj honestaj civitanoj sur nia planedo, alvoki al paco kaj interkomprenigo.

LEDA MILEVA, popola aganto de la arto kaj
kulturo, prezidantino de la Asocio de Tradukistoj en
Bulgario:

Mi opinias, ke se ĉiuj popoloj parolus inter si en la lingvo de la muziko, ne ekzistus miskomprenigoj, malpaco, militoj. Car por la muziko ne estas limoj kaj barieroj, ĝi parolas al ĉiuj homoj de la terglobo per sia profunde humana, komprenebla lingvo.

Ni pensu pri la belega Naŭa Simfonio de Beethoven komponita laŭ la teksto de la odo „Al la ĝoj“ de Siler. Tiu verko sendube apartenas al la plej grandaj revoluciaj verkoj en la tutmonda historio de la artoj. Se ni ekpensu pri la justaj, simplaj, humanaj vortoj, enplektitaj en la muziko „Vi brakumu vin, milionoj“, ni ne povus ne ektemi kaj en niaj koroj ne povus ne ekparoli la justeco.

„Vi brakumu vin, milionoj!“ — tiu fluganta frazo povus esti la devizo de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco. Ne estas mirinde, ke ĝi okazas ĝuste en nia lando, en Sofio. Car la Bulgara Komunista Partio kaj la popolo, gvidataj de sia unua partia kaj ŝtata gvidanto Todor Jivkov, ĉiam deziris tutkore la pacon kaj la komprenigon inter ĉiuj landoj kaj popoloj.

En nia maltrankvila jarcento la monda pacmovado estas apogo kaj hela espero por la homaro. Nun, kiam la teruro de tutmonda katastrofo denove ŝvebas super la planedo, kiam oni proklamas la novan usonan nuklean strategion — danĝera eksperimento kamufli

la rabemajn intencojn de la imperialismo, la Monda Parlamento iĝas la plej alta tribunalo de prudento kaj de humanismo. La voĉo de ĝiaj delegitoj sonas kiel potenca alvoko al la popoloj bari la vojon al termonuklea neniigo, gardi la pacon kaj la serenigon — nura savanta alternativo nun.

Neforgesebla signo de la vera literaturo ĉiam estas ĝia humanismo kaj ĝia profunda ligo kun la nuntempo. Hodiaŭ, kiel en la pasinteco, la plej grandaj mondaj verkistoj metas sian plumon je servo al la libero, al la socia progreso, al la homa frateco. Tie, kie la justeco estas subpremata, la plej bonaj literaturaj verkoj sonas per senmaskiga forto; tie, kie estas minaco, kie ekzistas sufero, la belarta vorto portas esperon, vekas la dormantajn konsciencojn.

Nia nuntempo, teruriga pro la amasigita potencialo de detruo, multobligas la respondecon de la verkisto, destinita plifortigi la fundamentojn de la paco, defendi la grandajn humanajn idealojn kaj la atingojn de la homa civilizacio. Grandegajn taskojn starigas la nuntempo same antaŭ la aganto de la traduka arto, kies krea laboro, rimedo por proksimigo kaj interkomprenigo de la popoloj, estas valorega kontribuo por konstruado de la pontoj al la paco, al la interkomprenigo, al la internacia amikeco.

LA MINACO

En nia ĉefurbo okazis la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco. Centoj da oratoroj parolis en la nomo de multaj milionoj da homoj kontraŭ la freneza konkurado en la armigado, kontraŭ la minaco de nuklea katastrofo, kontraŭ la frenezula strategio de Pentagono pri „limigita nuklea milito“, subtene al la sovetaj proponoj pri malarmigo. Kaj nia urbo estis honorita per la alta titolo „Urbo de la Paco“.

Jes, sed ne absolute ĉiuj en la mondo subtenis la Alvokon de la Monda Parlamento. Kelkaj ĵurnaloj, kiel tiuj de Springer (en GFR), eĉ vidis en ĝi ian komunistan konspiron. Vere, se ni ekpensos pli profunde super la alvoko, adresita de tiu parlamento al la popoloj de la mondo, ni malkovros en ĝi ne unu, eĉ ne du minacojn. Fakte ĉi tuta parlamento estis kaj restas tre granda minaco. Eĉ io pli ol minaco...

Ja imagu ni, ke la registaroj de ĉiuj landoj en

la mondo konsentus plenumi la Alvokon aŭ la popoloj igus ilin plenumi ĝin, kaj komenciĝus granda malmultigo de la armilaro ĝis ĝia plena neniigo. Tio signifus, ke la fabrikistoj de armiloj restos sen laboro, sen subteno kaj komencos almozi surstrate aŭ mortos pro malsato. Ĉu tio ne estas minaco per malsato kontraŭ parto de la homaro, nome la armilmagnatoj kaj ties karaj familioj?

Kaj ĉu oni pensis pri la sorto de unu tia grava parto de la homaro kiel la generalaro de NATO? Ni imagu, ke la militunuigojn, kiel proponas la landoj de la Varsovia Kontrakto, oni malfondos kaj novajn ne kreos. Kion laboros tiam tiuj grandaj specialistoj de la staboj? Krom la planado de „preventaj“ battoj kontraŭ la socialismaj landoj, de operacioj de „antaŭen elportita defendo“, de detruado de urboj kaj loĝlokoj, alian profesion ili ja ne havas. Ĉu kvalifikiĝi por io pactempa? Ofende, ni petas! Homoj kun tia alta prepariteco kaj tuj — ne detrui, sed konstrui! Okulfrapanta misuzo de fortoj de altkvalifikitaj kadroj.

Sed ni flankenlasu la aliajn aferojn kaj ni prenu la sorton de iuj prezidentoj. Se komenciĝos tia komuna paco, kiun pretendas la popoloj, kion faros tiuj prezidentoj en okazo de fiasko de ilia interna politiko? Aparte dum balotkampanjoj. Tiam ili ne povus kompensi en la milita sfero. Ili ne povus certigi, ke ties landoj estas minacataj de ekstera atako, pro kio oni devas streĉi la rimenzonojn. Kaj finfine tiaj prezidentoj fiaskos ĉe la balotoj.

Ankaŭ aliajn similajn flankojn havas la Alvoko de la Monda Pacparlamento de la Popoloj, kio montras, ke krom esti sonorilega alvoko kaj olivbranĉeto por la homaro, ĝi vere estas minaco por iuj homoj sur la tero...

El bulgara: K. K.



La superhomo

HONORITAJ ESPERANTO-LEKTOROJ

Laŭ la regularo pri honortitoloj de E-lektoroj la Buroo de CE de BEA en sia kunsido de 10. XI. 1980 honoris laŭ propono de la Instruista Sekcio jenajn multjarajn E-lektorojn:

ELSTARAJ LEKTOROJ

Bejko Markov — el Varna

Mihail Elenov — el Sofio

REKONITAJ LEKTOROJ

Manol Ĉolev — Velingrad
Nikola Godev — Velingrad
Simeon Baltaĝiev — Bjala



ĤRIMA

VIVO, DEDICITA AL ESPERANTO

90 JAROJ EKDE LA NASKIĜO
DE IVAN KRESTANOV

La E-movado neniam havis mecenatojn por akceli sian progreson, ĝi ŝuldas siajn sukcesojn al personoj, kiuj kun grandega sindono kaj kapablo propagandis la Internacian Lingvon kaj organizis la Movadon. Unu el la elstaraj bulgaraj propagandistoj de E-o estis Ivan Krestanov.

Naskita la 28an de oktobro en urbo Pirdop en malriĉa familio, li devis mem perlabori monon por viziti lernejon. En sia 14a jaraĝo li konatiĝis kun E-o, arde ekamis kaj fervore ellernis ĝin. De tiam (1904) ĝis sia forpaso en 1966 j. li estis senlaca propagandisto de nia lingvo.

La studentaj jaroj de Krestanov pasis en Francujo kaj Germanujo, kie li multon lernis de tieaj e-istoj. Kiel studento li kunlaboris al gazeto „Socia Revuo“. Reveninte la patrolandon kiel diplomita filologo kaj juristo li fariĝis lektoro de fremdaj lingvoj en Varna, Botevgrad, Plovdiv, Sofio kaj aliloke. Cie, kie li instruis germanan kaj francan, li malfermis ankaŭ kursojn de E-o kaj varbis adeptojn por ĝi. Kiam Krestanov estis lektoro en la gimnazio de Botevgrad, li gvidis kurson, kiun partoprenis ankaŭ la gimnaziano Todor Jivkov — la nuna prezidanto de la Stata Konsilio kaj unua sekretario de CK de Bulgara Komunista Partio.

En 1912 j. Krestanov eldonis lernolibron de E-o, kiun rekomendis la Ministerio de Popola Klerigo. Sekvis du vortaroj — esperanto-bulgara kaj bulgara-esperanta. Aperis tri eldonoj de la vortaroj, kio estis grava sukceso dum tiuj jaroj.

Grandajn meritojn havas Krestanov por la popularigo de la bulgara literaturo, kion li fervore faris. Bona stilisto, li majstre tradukis en E-on poemojn kaj prozaĵojn de P. R. Slavejkov, L. Karavelov, Iv. Vazov, Al. Konstantinov, T. Vlajkov, Elin Pelin, A. Strašimirov, D. Poljanov, C. Cerkovski k. a. En „Bulgara antologio“, kompilita de li, estas prezentitaj pli ol kvardek bulgaraj beletristoj kaj poetoj. En aparta libro aperis en traduko de Krestanov „Nuntempaj rakontoj“ de G. P. Stamatov. Kelkaj el

tiuj rakontoj aperis en ĉina kaj japana dank' al Krestanov. Pli ol cent liaj tradukaĵoj aperis en „La Revuo“ (Parizo), „Esperanto“ de UEA, „Literatura Mondo“ (Budapeŝto), „La Marto“ (Vieno) k. a.

Tiuj post la Unua Mondmilito en Svislando aperis la libro de Krestanov „La bulgara lando kaj popolo“, tre bone renkontita de la E-gazetaro kaj legantaro. En la de li kreita „Bulgara Esperanto-biblioteko“ aperis dudeko da libroj kaj broŝuroj en kaj pri E-o.

Dum kelka tempo Krestanov redaktis la organon de BEA „Bulgara Esperantisto“ kaj kunlaboris al „Enciklopedio de Esperanto“.

Pro siaj lingvaj kaj literaturaj meritoj Krestanov estis elektita membro de la Lingva Komitato (1912–1929) kaj membro de la Akademio de E-o (de 1947 j. ĝis la lasta spiro).

Inklina al migremo, li veturis dum 15 jaroj tra Eŭropo, de lando al lando ĝis Islando. Dum sia restado en fremdlando li faris pli ol mil prelegojn pri niaj lando kaj popolo.

En lia letero, aperinta en revuo „La nova etapo“ en 1932 j., oni legas: „Jam ĉe la fino de la mondilito mi eksimpatii al la laborista movado kaj ĝoje salutis per „Esperanto“ de UEA la reaparon de „Esperantista Laboristo“, fariĝante ĝia kunlaboranto kaj subtenanto.“ Tiu simpatio igis lin forlasi sian profesion kaj veturi al Parizo por labori kiel redaktoro en la eldonejo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). En ties periodaĵoj li publikigis pamfletojn kontraŭ la faŝistaj regantoj en Bulgario. Kiam Lanti komencis trudi al la laborista movado sian reakcian teorion de sennaciismo, Krestanov forlasis la postenon de redaktoro.

Reveninte sian patrujon li denove fariĝis lektoro de fremdaj lingvoj. Sed kiel instruisto li ne povis malkaŝe subteni la laboristan movadon. Tion li libere faris post la venko de la socialisma revolucio en nia lando (1944).

En septembro 1961 Krestanov vizitis sian iaman lernanton kaj kursanon Todor Jivkov por gratuli lin lige kun lia 50-jara jubileo. K-do Jivkov, tiutempe unua sekretario de CK de BKP, sincere akceptis lin en sia kabineto. En bona humoro ili ambaŭ rememoris pri la jaro 1926, kiam k-do Jivkov estis kursano de E-o kaj Krestanov — lia gvidanto.

Dum tiu vizito Krestanov konvinkigis, ke k-do Jivkov restas fidela amiko de E-o. Adiaŭante, li bondeziris pluajn sukcesojn al la partio, kiun gvidas k-do Jivkov.

Persia aktiva partopreno en la enlanda kaj internacia E-movado dum 62 jaroj Ivan Krestanov enĉizis por eterne sian nomon en la Verda Panteono.

LA MEDICINISTOJ ANTAŬ GRAVAJ TASKOJ

Eldiro de prof. Kiril Popov



Mi havas la honoron saluti tiun ĉi grandiozan kongreson je la nomo de la medicina sekcio de BEA kaj kiel prezidanto de la medicina E-Societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en Sofio.

La E-movado kaj la medicino kiel scienco kaj praktiko estas proksimaj laŭ sia humaneco. Tiu humaneco plej brile manifestiĝas en la personeco kaj tutviva laboro de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof — la kreinto de E-o.

Ĉiam estis kaj bedaŭrinde ankoraŭ estas homoj, kiuj anstataŭ ellerni E-on nur diskutadas kaj proponas diversajn. Ofte ili estas tre fuŝe informitaj pri E-o kaj atakas ĝin kiel malbonan nur pro tio, ke ĝi estas artefarita. Sed ili forgesas la simplan fakton, ke ĉiu homo naskiĝas sen lingvo, ke ĉiuj lingvoj tiusence estas io artefarita, kiun oni longe-longe — en familio kaj lernejo, per gazetoj, libroj, radio kaj televido — instruas. La malamiko de E-o forgesas aŭ ne scias, ke jam pasas preskaŭ unu jarcento, de kiam ekzistas E-o, kaj dum tiu tempo ĝi brile manifestis siajn kvalitojn kaj estis elprovita en ĉiuj sferoj de la homa

agado. En E-o oni bonege esprimas la buntajn pensojn kaj sentojn de la homo, en ĝi oni verkas belartan prozon kaj poezion, per ĝi oni esperimas ĉiujn ideojn kaj dezirojn. La neŭtrala lingvo E-o estas taŭga batalilo por la plej helaj ideoj de la homaro — la internacia amikeco kaj kunlaboro kaj la tutmonda paco. Do tia lingvo ne plu devas esti subtaksa kaj neglekta! E-o estas raciigita internacia lingvo kaj ĝi havas ĉiujn kvalitojn esti ponto inter la popoloj sen diskriminacio de la naciaj lingvoj. En nia E-laboro ni ĉiam devas ĉerpi instigon de la penso de l'granda Lenin, ke privilegio devas esti por neniu nacio, por neniu lingvo.

Mi opinias, ke grava devo de ĉiu konscia e-isto kaj aparte de la e-istoj filologoj kaj la Akademio de E-o estas tio — ĝuste ekspliki la esencon de E-o kiel viva internacia lingvo kun grandaj perspektivoj por la estonto.

Kelkajn vortojn pri la vivo kaj agado de nia medicina societo. Ĝi estas fondita per la helpo de la medicina sekcio de BEA. Jam du jarojn ĝi ekzistas. Ĝia ĉefa tasko — disvastigi E-on inter la medicinistoj, organizi ilin, subteni la uzon de E-o serve al la medicina scienco kaj praktiko, kontaktigi nian E-medicinistaron kun eksterlandaj kolegoj. La unua zorgo de nia societa estraro estis refreŝigi la lingvokonojn de niaj membroj, helpi ilin atingi pli altan nivelon. Ĉiusemajne okazas niaj societaj kunvenoj. El la membroj de la societo 25 partoprenis la duan internacian E-konferencon en Hungario en 1979.

Nun antaŭ ni staras la granda tasko — bone organizi la 11an internacian konferencon de medicinistoj, kiu okazos ĉe ni en julio 1981 en u. Ruse. Tiu tasko devas mobilizi ĉiujn medicinajn e-istojn. Aparte ĝi devas instigi ilin perfektigi siajn lingvokonojn por povi plenvale partopreni la konferencon kaj kontakti kun siaj kolegoj el diversaj landoj. Lige kun la 1300a datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato ni klopodos eldoni libron kun materialoj pri la stato de la sanprotektado en Bulgario.

Pri la raporto de CE de BEA: ĝi plene kontentigas min kaj mi akceptas ĉiujn konstatojn kaj proponojn en la rezolucio. Ni, la medicinistoj, solene promesas doni indan kontribuon por ties realigo.

EN KLUBO DE LA ESPERANTISTO

Por ke la laboruloj, sendepende de sia profesio, povu ripozi post la labortago kaj la sekvan tagon labori ankoraŭ pli produktive, tre grave estas, kiel ili pasigas sian liberan tempon.

Pri tiu problemo dum la lastaj jaroj okupiĝas ankaŭ la Sindikata Domo de Kulturo en u. Loveĉ. Ĉe ĝi funkcias diversaj kluboj — de filatelisto, numizmatikisto, instruisto, esperantisto k. a., al kiuj oni disponigas la materialan bazon de la sindikatoj.

Unu el la plej agemaj inter tiuj kluboj estas la esperantista.

En ĝi membras reprezentantoj de la intelektularo — instruistoj, kuracistoj, inĝenieroj k. a., kaj de la laborista klaso — produktantoj el la maŝinkonstrua kombinato „Balkan“, la uzino de tubmeblaro k. a. Ĉiuj aŭde ili kolektigas por konversacii dum unu horo en E-o. Ili aŭskultas lekciojn de lektoroj de societo „Georgi Kirkov“ pri diversaj temoj, organizas gastadojn

kun samspecaj kluboj el la lando kaj eksterlando kun la celo interŝanĝi spertojn k. a. Aparte bona kunagado efektiviĝas kun la klubo de la ordenportantoj kaj laboravangarduloj, en kiu membras produktantoj de materialaj valoraj, farigitaj konataj kaj estimataj dank' al sia laboro.

La klubo de la e-isto starigis antaŭ si la taskon per korespondado kun e-istoj kaj E-kluboj ĉe kulturdomoj en la socialismaj landoj, aparte en la multaj respublikoj de Sovetunio, trastudi la ritmojn ĉe komencado de laboro kaj ofico kaj ĉe emeritigo. Post tio estos eldonita broŝuro, kiun oni disvastigos inter la laborkolektivoj por popularigi la pozitivan sperton en la frataj landoj.

Atentigo de la redakcio: Forte rekomendante la sperton de niaj s-anoj el Loveĉ, ni donas la adreson de la klubo: Profsajuzen Dom na Kulturata, Klubo de la Esperantisto, 5500 Loveĉ, Bulgario.

Cočo Kolarov

LA E-SOCIETO EN PAZAR- GIK 70-JARA

Fondita antaŭ 70 jaroj, E-Societo „Radio“ en Pazarĝik rapide farigis grava faktoro en la kultura kaj socia vivo de la urbo kaj ĝia distrikto. Kaj tute ne estas hazarde, ke en ĝi laboris pluraj antifasistoj, pereintaj en la batalo: Todor Kolarov, Angel Čaušev, Nikola Mišev, Stefan Škodrov, Stojan Mančev, Nikola Bečev, d-ro Ivan Srebrin, Stojan Čočkov, Vela Peeva, Stojan Kalpazanov k.a.

La 12an de oktobro en la granda salono de la Distrikta Junulara Domo de la urbo okazis solena celebrazo de tiu glora jubileo. Ĉeestis ĉirkaŭ 350 gee-istoj kaj altrangaj gastoj: Petko Petkov — unua sekretario de la DK de Bulgara Komunista Partio kaj kunlaborantoj de la komitato, la prezidanto de la Komunuma Estraro de Bulgara Agrarista Popola Asocio (BZNS) Aleksandro Spasov, la sekretario de la Komunuma Komitato de Partolanda Fronto Penka Čokova, la unua vicprezidanto de la Urba Popola Soveto Nikola Sopov k.a.

Sur la brusto de ĉiu partoprenanto estis kroĉita la speciala jubilea insigno kaj donita la aperigita pro la okazo libreto pri la historio de la urbo kaj la E-societo.

Raporton pri la agado de la E-societo faris Petko Arnaudov — sekretario de la Distrikta Estraro de BEA.

K-do Nikola Sopov salutis la esperantistaron en la nomo de la urbestro, kiu forestis el la urbo, kaj anoncis la decidon de la Stata Konsilio pri distingo de la societo per la ordeno „Kiril kaj Metodi“ — II grado, kaj la decidon de la Urba Popola Soveto, ke centra strato de la urbo estu nomita „Esperanto“. K-dino Čokova salutis en la nomo de la urbaj soci-politikaj organizaĵoj kaj anoncis, ke la Urba Komitato de Partolanda Fronto donacas al la societo bibliotekan ŝrankon.

Gratulojn faris kaj enmanigis donacojn ankaŭ la reprezentantoj de 20 aliaj urboj — Sofio, Plovdiv, Varna, Ruse, Haskovo, Jambol, Gălabovo k.a. Krome estis ricevataj gratuloj el 50 E-organizaĵoj kaj apartaj e-istoj el pluraj landoj — USSR, GDR, Francio, Pollando, Nederlando, Hungario, Portugalio, CSSR, Japanio k.a.

En la nomo de la Centra Estraro de BEA gratulis la societon-jubileon k-do Kunčo Vălev kaj faris kaptantan priokazan paroladon. Li donacis la valoran libron „Enciklopedio de Esperanto“ por la societa biblioteko kaj anoncis, ke CE de BEA distingas per honora atesto kaj la Honora Insigno de BEA la E-veteranojn Ivan Vasilev, Kosta Konstantinov (ankaŭ proklamita kiel honora membro de BEA), Stojan Tanev, Manol Čolev el Velingrad (ankaŭ proklamita kiel honora membro de BEA), Petko Arnaudov. K-do Vălev ornatis la brustojn de pluraj sindonaj aktivuloj de la societo per oraj kaj argentaj insignoj de BEA.

Okaze de la jubileo estis aranĝitaj de la societo du ekspozicioj: en la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco (infanpentraĵoj el Prago kaj Hartvikovice — CSSR, senditaj de s-ano František Sedláček) kaj en la Junulara Domo (pri la internacia korespondado de la societo kaj la societanoj). Gasto de la solenaĵo kun sia ekspozicio de 15 tabuloj pri la internacia E-korespondado estis k-do Georgi Litov el Sofio. Pro sia riĉeco kaj beleco liaj tabuloj aparte altiris la atenton de la publiko.

La solenaĵo finiĝis per riĉa belarta programo, kiun partoprenis per recitaĵoj Magdalina Georgieva, Rosica Georgieva kaj Vladimir Georgiev el Pazarĝik kaj per kantoj la artisto Veselin Damjanov el Sofio, laŭreato de internaciaj konkursoj, kaj la artistino Galja Kostova el la muzikteatro de Jambol.

Post la solena kunveno oni metis florojn antaŭ la monumenton de Vasil Levski — la Apostolo de la Libereco, kaj faris komunajn fotojn. P. A.

SUKCESE KOMENCIĜIS LA NOVA LERNOJARO

La nova lernejo en Ruse estis malfermita solene la 14an de oktobro en la klubo de E-societo „Libero“. Ĉeestis la aligintoj al la E-kursoj kaj membroj de diversaj E-societoj.

La instruistino Listarova prezentis muzikprogramon en E-o kun sia klaso. K-do Georgi Akaliev el la DE donis informojn pri la novaj kursoj.

E-Societo „Libero“ organizas du kursojn — unu por civitanoj sub la gvido de Maria Belčeva kaj alian en uzino sub la gvido de Sofia Sutrova. La nova E-societo „Kulturo“ organizas kurson kun gvidanto Nadejda Sirkova. La junulara sekcio — en la Distrikta Junulara Domo sub la gvido de Krum Bučukov. La transporta E-societo organizas kvar kursojn, kun gvidantoj Stefan Popov, Sofia Sutrova, Stojan Vojčev kaj Georgi Akaliev. Kurso en la distrikta hospitalo gvidos la E-veterano Boris Kavalĝiev. Do entute 9 kursoj kun 96 gekursanoj.

Stojčo Čankov



PLIBONIGITA MATERIALA BAZO

E-societo „Dičo Petrov“ en u. Čepelare estas nur 14-jara, malgraŭ ke kursojn de E-o oni okazigis jam en 1926 j. Nun la societo havas 50 regulajn membrojn. Krome en ĝi membras ankaŭ 20 lernantoj. En la sekcio de sporta lernejo okazas vigla kulturamasa agado: oni prezentas literatur-muzikajn programojn, organizas ekskursojn k.a. Estas kolektitaj refoje uzablaj defalaĵoj, sovaĝaj fruktoj, drogherboj.

La anoj de la societo organizas radiohorojn, aranĝas vitrinojn, korespondas kun fremdaj kaj bulgaraj samideanoj.

Kun la helpo de la Distrikta Estraro de BEA en Smoljan la E-societo jam posedas propran klubon, kiu konsistas el tri ejoj. Tiel nia materiala bazo riĉiĝis, estis kreitaj kondiĉoj por pli bona agado. Oni havigis modernajn instruhelpilojn: magnetofonon, gramofonon, diaskopon k. a.

Nun la nova lernejo komenciĝis en nova klubejo.

Dimitro Marev

La klubejo de E-societo „Dičo Petrov“ en urbo Čepelare.



En Velingrad sukcese finiĝis la Va Internacia Esperantista Seminario-Ferio (IESF). De la 20a ĝis la 30a de septembro en la moderna kursejo „Elbrus“ apud bela pinarbaro grupoj el Pollando kaj Ĉeĥoslovakio kaj reprezentantoj el USSR, Francio, GDR, Hungario kaj Bulgario aktive partoprenis riĉan varian programon.

Lektoro estis s-ino Eva Farkaš el Budapeŝto. Prelegis: d-rino Poŝlupkova — „Feriado kaj kuracado en Velingrad“, Manol Colev — „La batalo por mond-paco kaj E-o“, „E-tradicio kaj sukcesoj en Ĉepino-regiono“. Ivan Sergiev parolis pri la lerneja esperantista blovorkesto kaj la perspektivoj de kunlaborado. La emociu renkontiĝo kun k-do Todor Peev — frato de la bulgara heroino Vela Peeva, la originalaj prelegoj de Manol Colev pri la heroo urbeto Batak, pri la legenda partizana brigado „Anton Ivanov“ kaj la partizantamento „Ĉepinec“, la vizito de la historia kaj kultura rezervato „Rila Monaĥejo“, la konatiĝo kun la grandega socialisma konstruado en Rodopo — ĉio ĉi estas nedisigebla parto de la programo.

La seminario-ferio en Velingrad estis riĉa je turismo tra la ora aŭtuno de la bulgara sudo, je sportaj matenaj promenadoj kaj fizikaj ekzercoj, je lingva perfektigo sub la majstra gvido de s-ino Farkaš, je banado en mineralakvaj termalaj banejoj kaj sunbruniĝo sur la plaĝo, je projekciado de filmoj pri Velingrad, ĝia regiono kaj la Popola Artistoj Nikolaj Gjaurov — mondfama baso, kies naskiĝloko estas Velingrad.

Okazis interesaj ekskursoj: al Batak kun ĝia Pan-teono de la Aprila Ribelo kontraŭ la otomana jugo, al la subtera elektrocentraro kaj barajo „Batak“, al montopinto Ostrec, Rila Monaĥejo, montodomo „Kladova“, la pereoloko de Vela Peeva.

Neforgeseblaj restas la renkontiĝo kun la E-junularo en diskoteko „Ĉepino“, la projekciado de koloraj dia-pozitivaj fare de k-do Colev, la koncerto de la blovorkesto de Ivan Sergiev, la renkontiĝo kun la loka esperantistaro. Oni gratulis E-Societon „Stoju Kal-pazanov“, gajninta la 1-an premion en la tutlanda antaŭkongresa konkurado de BEA.

E-kantoj, dancado je muzikaj plenumoj de Ivan Sergiev, verkoj de la junularo LIMER (Literatura Muzika E-Rondo) kun muziko de Maja Bizova estis novaj interesaj momentoj en la programo.

Ĝis malfrua horo daŭris la Vespero de la Nacioj. Apartan laŭdon kaj dankon meritis la folkloro geler-nanta ensemblo sub la gvido de k-dino Mirĉeva. Per siaj kolorriĉaj popolaj kostumoj, belegaj kantoj kaj popoldancoj, per sia vivgajeco kaj ĉarmo la geler-nantoj gajnis la korojn de la gastoj. Ĉiujn poezie gratulis k-dino Ljubka Popova. Bele sin prezentis ankaŭ la grupoj el CSSR kaj Pollando, la ceteraj gastoj.

La seminario estis aktive profitita por pedagogia interŝanĝo de sperto kaj praktika kunlaborado inter la E-societoj kaj kluboj. La societo de Velingrad ĝemeliĝis kun la E-klubo en urbo Trebiĉ (CSSR) kaj la E-societo en urbo Koŝalin, Pollando.

La 27—28 an de septembro la estraro de Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ) okazigis en la urbo seminario por aktivuloj. K-do Dimitro Papazov, sekretario de BEA, emfazis la grandan perspektivecon de Velingrad kiel estonta centro de internaciaj E-aranĝoj.

Por la bona sukceso de la ĉi-jara IESF apartan meriton havas la helpo kaj subteno de la lokaj amas-organizaĵoj, la kursejo „Elbrus“, la aktivularo de E-Societo „Stoju Kalpazanov“.

Dimitro Jdrakov

Ĥ Bonega iniciato de niaj samideanoj el u. Petriĉ — organizi kaŭtanvesperon, kiu ekde nun fariĝos tradicia, do ĉiujara.

La 18 an de oktobro al la bela suda urbo Petriĉ, situanta en la piedoj de monto Belasica, veturis per vagonaro, aŭtoj kaj mikrobusoj multaj e-istoj diverslokaj (eĉ el tiaj malproksimaj urboj kiel Razgrad, Burgas, Sliven). Ĉiuj kolektiĝis en la nova belega montodomo Belasica, troviĝanta en la samnoma monto. Plej grandaj grupoj estis el Sofio, Plovdiv, Velingrad, kaj, kompreneble, el Petriĉ.

La vespero komenciĝis per belarta programo fare de la dommastroj. Bonege, vigle kantis junulina E-horo sub la gvido de nia energia samideano Ivan Apostolov. En la nomo de CE de BEA salutis la ĉ. 200 ĉeestantojn k-do Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA. Li aparte emfazis la plej gravajn antaŭstarantajn taskojn: bona organizado de la nova lernejo kaj sistema laboro fare de ĉiu e-isto por plialtigi sian lingvan nivelon; bona organizado de la abonkampanjo por E-periodaĵoj; obstina laŭplana agado por organiza stabiligo de la E-societoj kaj E-sekcioj, de niaj distrik-taj estraroj.

Sekvis komuna vespermanĝo, kiu finiĝis per manĝado de kaŭtanoj, anticipe kolektitaj kaj preparitaj de la afablaj dommastroj. Ĉiu gasto ricevis donace ankaŭ po unu bela granato. La vespero finiĝis per kelkhora dancado kaj amuzado sub la sonoj de vigla junula orkestro.

La sekvan matenon okazis kunsido de reprezentantoj de ĉiuj partoprenantaj grupoj, E-societoj kaj sekcioj. La kunsido montriĝis tre utila. Ĝin gvidis k-do Dimitro Papazov — organiza sekretario de BEA.

Tuj poste oni vizitis la monumenton de du bravaj bulgaraj filoj — soldatoj-limgardantoj.

Dum la tuta cetera tempo oni kolektis kaŭtanojn en la arbaro, kiuj vere abundis sub la centjaraj kaŭtanoj post la nokta ventego kaj pluvo.

Dankon al niaj samideanoj el Petriĉ, unu-loke al Ivan Apostolov, Dimitro Atanasov, Kiril Hlebarov, Violeta Apostolova k.a., kiuj donis multajn fortojn kaj tempon por bone prepari ĉion necesan por tiu neforgesebla renkontiĝo.

K. K.

VETERANOJ AKTIVINTAJ EN LA ESPERANTO-SOCIETO EN VARNA DUM LA PERIODO 1914—1944,

ĉu vi aliĝis al la veterana renkontiĝo, okazonta la 20—21-an de decembro? Se ne, tuj sendu 10 levojn (5 por vespermanĝo kaj 5 por 2 noktumoj) kun klariga letero al: Ĉojatko Lilov Jolov — 9010 Varna, ul. Asen Halaĉev 4 K, ap. 50. Ni petas ĉiujn estrarojn kaj unuopajn aktivulojn sciigi al la koncernaj personoj pri tiu unika kaj tre interesa renkontiĝo!

CELEBRO DE DIMITRO PENČEV



Lige kun la 60-jariĝo de Dimitro Penčev — aktivulo de E-Societo „Vekigo“ en Sumen, okazis celebrazo, kiun ĉeestis membroj de la societo kaj aliaj civitanoj. Pri la vivovojo kaj agado de la jubileulo parolis Cvjatk Stojanov — prezidanto de „Vekigo“.

Naskita en vilaĝo Dičin, distrikto Veliko Tŕrnovo, Penčev estis bona lernanto, verkis infanversajetojn, ludis violonon. Gimnazion li studis en Pavlikeni, kunlaborante dum tiu tempo al j. „Horovod“, redaktata de Celkaŝ. Kiam li eksciis pri la internacia lingvo E-o, li fervore ellernis ĝin kaj komencis korespondadon kun eksterlandaj e-istoj. En 1940 j. ekstudinte en la instruista instituto en Sumen, Penčev tuj trovis la rondon de la lokaj e-istoj, eklaboris kun progresmaj homoj. En la kontraŭfascista milito (1944–45) li partoprenis kiel leŭtenanto de 31a regimento de Silistra. Hela radio dum la pezaj milittagoj estis liaj renkontiĝoj kun kroataj kaj hungaraj e-istoj.

En marto 1945 j. Penčev estis grave vundita kaj restis ses monatojn en hospitalo en Sofio. De tiu tempo kara rememoro por li restas la vizito de grupo da e-istoj, kiuj eksciis pri lia vundigo.

De 1948 ĝis 1961 Penčev estis oficiro en la Bulgara Popola Armeo. Post sia ekŝigo el la armeo li laboris dekon da jaroj en Sumen.

Kiel membro de societo „Vekigo“ D. Penčev estis ĉiam aktiva, disciplinita. Pro tio dum la lasta distrikta konferenco li estis elektita membro de la Distrikta Estraro de BEA en Sumen — respondeculo pri la instrulaboro.

Krom kiel sociaganto kaj e-isto Dimitro Penčev estas konata ankaŭ kiel verkanto-humoristo. Li kunlaboras al j. „Sumenska Zarja“ per humoraj kaj satiraj verkoj kaj estas unu el la fondintoj de la klubo de humoristoj kaj satiristoj en la urbo.

K-do Penčev estas portanto de 9 ŝtatordenoj kaj medaloj kaj distingulo de la Popolaj Leĝoj. Ĉie ĉiam nia samideano Penčev propagandis la amatan lingvon E-o kaj la helajn celojn de la E-movado, varbis novajn adeptojn de nia afero.

Bukedo de ruĝaj dianoj kaj la honora insigno de BEA estis esprimo de estimo kaj rekono al la kara jubileulo. Fine de la celebrazo li traĝis siajn humorverkojn, vikle aplaudita de la multnombra publiko.

Cvjatko Todorov

VIGLA SOMERA E-AGADO EN LOVEČ

Por la e-istoj de Loveč la somero ĝis nun ordinare estis tempo de ripozado, la E-agado ĉesis. Sed ĉi-somere la tradicio estis rompita. La membroj de la urba E-Societo „Espero“, la laborista „Balkano“, la medicinista „D-ro Zamenhof“ kaj la lernejana „Georgi Ivanov“ aktive agadis. Ili efektivigis kelkajn gravajn E-aranĝojn.

Je la 14a de junio en la distrikta junulara domo okazis antaŭkongresa E-renkontiĝo. En ĝi partoprenis ankaŭ e-istoj el Trojan, Karlovo kaj Gorna Orjahovica. Oni amuziĝis, dancis, kantis ĝis noktomezo. La amikan amuzvesperon ĉeestis ankaŭ la pola ĵurnalisto Stanislav Kubik—gasto de la loka ĵurnalo „Zarja na Komunizma“ (Aŭroro de la Komunismo). Tiu nia hazarda gasto travivis agrablajn minutojn dum la amika renkontiĝo. Sur lia vizago ĉiam floris gaja rideto, liaj okuloj brilis, li dancis senlace. Poste en raportajo en sia ĵurnalo „Tribuna Odrjanska“ li rakontis pri ĉio ĉi, pri siaj neforgeseblaj travivaĵoj en E-medio en Loveč. Inter alie li proponis al siaj legantoj lerni la lingvon de la amikeco kaj nepre kontaktiĝi kun la bulgaraj e-istoj.

Granda grupo da e-istoj, organizita en turisma aŭtomobila karavano, partoprenis la 40an jubilean kongreson de BEA en Plovdiv. Dum la kongresaj tagoj ili ekskursis al Pamporovo kaj konatiĝis kun la beleco de Rodopo.

Tri niaj reprezentantoj vizitis Pollandon, kontaktiĝis kun polaj e-istoj kaj interkonsentis pri reciproka interŝango de E-grupoj. Ili sukcesis starigi kontakton kun junaj polaj e-istoj el Poznań. Rezulte de tio en aŭgusto 16 gejunuloj venis en Loveč por amika gastado. Honore al siaj gastoj loveĉanoj organizis amuzvesperon en la distrikta junulara domo. Tie la polaj gastoj konatiĝis kun e-istoj el Loveč kaj Trojan. Kamaradoj Koljo Pančev, E-veterano, kaj Ivan Liŝev, konata E-lektoro kaj E-aganto, konatiĝis al la gastoj la E-agadon en Loveč — la urbo de la siringoj, kaj en la bela montara urbo Trojan.

La sekvan tagon la polaj e-istoj, akompanataj de siaj loveĉaj amikoj, forvetaris al Trojan, kie la afablaj dommastroj montris al ili la vidindaĵojn de sia urbo: la urban historian muzeon, la Trojanan Monaĥejon kaj la natursciencan muzeon en v. CerniOsām. La saman vesperon en parko „Esperanto“ en vilaĝo Borima, kie feriis multe da homoj, okazis vespero de amikeco. Krom la polaj gastoj ĉeestis ankaŭ la esperantista franca familio Dimulen el urbo Tur, kiu feris en Borima gaste al lokaj e-istoj. Post salutvortoj la lokaj gejunuloj prezentis belartan programon. La gastoj kantis polajn E-kantojn. Regis bonega amika atmosfero. Ĉiuj amuziĝis ĝis noktomezo.

Kiril Kalčev

KONKURSO PRI VERKADO DE LERNOLIBROJ

1. La estraro de la Instruista Sekcio deklaras anoniman konkurson pri verko de lernolibroj de Esperanto:

- a) por infanoj de 10 ĝis 14-jaraj komencantoj;
- b) por civitanoj — komencantoj;
- c) por civitanoj — progresintoj (II-a grado).

2. La partoprenantoj devas sendi almenaŭ la unuajn 12 lecionojn (en 2 ekzempleroj) ĝis la fino de oktobro 1981 al la adreso de BEA kun surskribo sur la koverto: „Por la konkurso pri lernolibroj“. Sur la titolpaĝo la aŭtoro skribas pseŭdonimon. En decembro 1981 li sendas en koverto slipon kun la pseŭdonimo, sia nomo kaj adreso. Sur la koverto devas esti surskribo „por la konkurso pri lernolibroj“, por ke oni ne malfermu ĝin antaŭ la decido de la juĝkomisiono.

3. Rajtas partopreni ankaŭ aŭtoraj kolektivoj kun komuna pseŭdonimo.

Ĉiu aŭtoro rajtas prezenti pli ol unu lernolibron kun la sama aŭ diversaj pseŭdonimoj; ĉiu lernolibro estos pritaksata aparte.

4. Atribuiĝos po tri premioj por ĉiu speco:

- I premio — 250 levoj; II premio — 200 levoj; III premio — 150 levoj.

Laŭ decido de la juĝkomisiono povus atribuiĝi ankaŭ instigaj premioj.

5. La lernolibroj estos pristuditaj kaj pritaksitaj de juĝkomisiono konsistanta el sep spertaj pedagogoj el diversaj loĝlokoj de la lando. Ili kaj membroj de ties familioj ne rajtas partopreni en la konkurso

per siaj projektoj de lernolibroj.

6. Ĉiu juĝkomisionano pristudas la projektojn de lernolibroj kaj memstare difinas al ĉiu poentojn de 1 ĝis 6, kiujn li skribas sciigas al la prezidanto de la juĝkomisiono. La cifero 1 montras, ke la lernolibro estas proponata por la unua premio, 2 — por la dua, 3 — por la tria, 4 — eventuale por instiga premio. 5 kaj 6 oni metas al nesufiĉe bonaj kaj netaŭgaj projektoj. Unu komisionano ne rajtas fiksi saman premion (1—3) al pli ol unu lernolibro de la sama speco.

7. La prezidanto de la juĝkomisiono adicias la pritaksojn de la sep komisionanoj pri ĉiu lernolibro aparte kaj la juĝkomisiono en kunsido difinas la premiojn laŭ jenaj principoj:

- a) lernolibro ricevinta ĝis 10 poentojn ricevas unuan premion;
- b) lernolibro ricevinta ĝis 17 poentojn ricevas duan premion;
- c) lernolibro ricevinta ĝis 24 poentojn ricevas trian premion;

d) La juĝkomisiono povas atribui instigajn premiojn al projektoj ricevintaj ĝis 31 poentojn.

8. Post la difino de la premioj oni malfermas la kovertojn kun la nomoj de la aŭtoroj kaj faras protokolon.

9. La premiojn oni anoncas en „Bulgara Esperantisto“ kaj la Informilo pri la instrulaboro.

10. Oni proponas la premiitajn lernolibrojn laŭvice por eldonado. La juĝkomisiono rajtas doni al la koncernaj aŭtoroj rekomendojn por plibonigo.

VIGLA ESPERANTISTA ŜAKAGADO EN TÂRGOVIȘTE

La esperantista ŝakrondo, amika al E-Societo „Verda Eskadrono“ en u. Târgoviște, ekde sia fondiĝo (1978) agas organizite.

Nia celo estas popularigi la ŝakludon inter la e-istoj kaj la Internacian Lingvon inter la ŝakludantoj. Ĉiun merkredon la grupo kolektiĝas en la distrikta junulara domo. Tie ni disponas pri ejo kaj ludbazo.

Sub la zorgoj de la sperta gvidanto Vasil Colakov la partoprenantoj perfektigas sin kiel en la ŝakludo, tiel ankaŭ en E-o.

Dum la tri jaroj da organizita vivo nia grupo havis reprezentantojn en la ŝakfestivalo de Esperantista Ŝakligo Internacia (ESLI). Ĉi-jare el Ĉeĥe Budjovice (CSSR) ili alportis valoran honorvazon, kiun gajnis nia rondano Najden Hristov. Li okupis la unuan lokon en sia grupo.

En oktobro 1979 niaj ŝakaktivuloj organizis simulanturniron de samtempa ludo por pioniroj dediĉitan al la Jaro de la Infano, en kiu partoprenis 35 pioniroj.

Dediĉe al la 110a datreveno de la naskiĝo de Lenin oni okazigis internan individuan konkuradon. La gvidantoj de la grupo interkonsente kun la estraroj de E-Societo „Verda Eskadrono“ kaj de la ŝaksekcio de BEA intencas organizi individuan korespondan turniron kun 12 ŝakludantoj el nia lando, dediĉitan al la XII kongreso de BKP kaj 1300a jubileo de la bulgara ŝtato. Tiu ĉi turniro komenciĝas la 1an de oktobro kaj finiĝos la 30an de decembro 1981.

En 1982 la laboro vastiĝos kaj ĉiuj dezirantoj ludos koresponde en la grupo laŭ sia grado aŭ koefficiento.

Ni invitas ĉiujn dezirantojn aliĝi al la ŝakturniroj „Târgoviște — 81“ kaj la E-ŝakfestivalo I en 1981.

La aliĝiloj por la korespondaj ŝakturniroj (1980—1981) devas enteni krom la plena adreso ankaŭ la koefficienton kaj gradon ricevitajn en turniroj de BFS.

Aliĝilojn kaj demandojn pri la korespondaj ŝakturniroj sendu al adreso: Târgoviște, ul. „Dunav“ 9/20, Vasil Colakov.

Dimitro Ivanov

EKSTERLANDAJ GASTOJ EN KNEJA

Ĉi-aŭguston la e-istoj de u. Kneja estis tre ĝojaj renkonti en diversa tempo du eksterlandajn samideanojn.

La irana e-isto Acbar Sedagnat venis gaste al sia leteramikino Petruška Damjanovska. Okazis ankaŭ renkontiĝo kun aliaj lokaj e-istoj. Oni montris al la estimata gasto vidindaĵojn de la urbo.

Post nelonge venis gaste la nederlanda e-istino Ria Cluister Koenun kun sia familio. Jam 14 jarojn ŝi korespondas kun k-dino Stefka Konovska el Kneja. Kaj jen la renkontiĝo finfine okazis. Prave diras nia popolo: „Monto kun monto neniam renkontiĝas, sed homo kun homo — ĉiam eblas“.

La gastado de ambaŭ samideanoj impresis forte la loĝantaron. Oni praktike konvinkigis, ke E-o bone servas al la homoj trans limoj.

Boris Gorniŝki

E-istoj el Kneja kun sia gasto Acbar Sedagnat (en la mezo)



ĤRISTO SMIRNENSKI
bulgara proleta poeto
(1898—1923)

SOVETA RUSIO

El fer' estis via kiraso —
vi forĝis l'animojn el fer'
kaj staras vi kiel koloso
tutpreta por lukto kun fier'.

Kaj super vi flamis ĉielo,
brilegis fulmegoj sen ĉes'
kaj frapis kirason stelhelan,
sed vane — sen ajna sukces'.

Ho, svarmis dumnokte hienoj,
ne kaptis vin, tamen, panik',
ne trafis vin sagoj venenaj,
ĵetataj de fimalamik'.

Ĉar via kiraso estis fera,
kaj via kor' estis el ŝton'.
Vi pasis l'abismon inferan
sen tim' antaŭ blanka demon'.

Nun ĉesas jam ŝtormoj ribelaj,
karesas vin sun' de l'esper'.
Ho, land' de okuloj bluhelaj,
venkanta sen halt' kun fier'!

1923 j

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

A. P. ĈEĤOV

LI TROSALIS

El la repertuaro de la E-teatro en Leningrad:
dramigo de Ĉeĥov-rakonto

La termezuristo Gleb Gavriloviĉ Smirnov alveturis stacion Gniliŝki. Ĝis la bieno, kien li estis vokita por termezurado, necesis ĉevalveturi ankoraŭ tridek-kvardek verstojn. (Se la veturigisto ne estus ebria, kaj la ĉevaloj ne estus aĉaj, tiam eĉ tridek verstojn ne estos, sed se la veturigisto estus ebria kaj la ĉevaloj malgrasiĝintaj, tiam eĉ kvindek verstojn oni kalkulos).

— Bonvolu diri, kie mi povas trovi ĉi tie poŝtajn ĉevalojn? — alparolis Gleb Gavriloviĉ la stacion gendarmon.

— Kiajn? Poŝtajn? Ĉi tie, en ĉirkaŭo de cent verstoj, vi eĉ taŭgan hundon ne trovos, ne nur poŝtajn ĉevalojn... Sed kien vi deziras veturi?

— Al Devkino, al la bieno de generalo Hoĥotov.

— Nu, — oscedis la gendarmo, — iru malantaŭ la stacidomon, tie en la korto iufoje estas kamparanoj, ili veturigas pasaĝerojn.

La termezuristo ekspiris kaj sin trenis malantaŭ la stacidomon. Tie post longa serĉado, interparoloj kaj hezitaj li trovis korpulentegan kamparanon, malserenan, variolkavan, vestitan en ŝirajo kaj bastoŝuoj.

— Diablo prenu vian ĉaron! Ne eblas kompreni, kie estas ĝia malantaŭa parto, kie la antaŭa...

— Kial do ne kompreneblas? Kie estas la ĉevala vosto, tie estas la antaŭa, kaj kie sidas



via moŝto, tie estas la malantaŭa...

— Ĉu ni tiel la tutan vojon veturos?

— Ni alveturos! La ĉevalineto estas juna, vigla... Nur lasu ŝin ekkuri, poste ne eblos ŝin haltigi. Nu-u-u, malbenita!

— Kiaj dezertaj lokoj, vera sovaĝejo! Se oni atakus kaj prirabus vin, neniu ekscius, eĉ kanonpafu... Ankaŭ la veturigisto estas malfidinda... Jen kia dorsego! Se tiu ĉi infano de la naturo vin per fingro tuŝus, tuj la animo forigos. Kia vizagaĉo, besteca, suspektinda. Hej, karulo, kiun nomon vi havas?


— Ĉu mi? Klim.

— Diru, Klim, kiel estas ĉi tie? Ĉu ne danĝere? Ĉu oni ne fipetolas?

— Kviete, dank' al dio... Kiu fiagus ĉi tie?

— (Al si.) Estas bone, ke oni ne fiagas...

Sed por ĉiu okazo mi tamen kunprenis tri revolverojn kaj pri revolvero oni ne povas ŝerci. Dek rabistojn oni povas venki... Sed kien do li veturigas min? La tutan tempon veturis rektan kaj nun subite — maldekstren. Veturigis min, la fripono, en iun arbardensejon kaj... kaj... Ekzistas ja okazoj! (Al la veturigisto). Do, vi diras, ke ĉi tie estas ne danĝere? Domaĝe... Mi ŝatas batali kontraŭ rabistoj... Mi aspektas malgrasa, malsana, sed mi estas forta kiel bovo... Foje min atakis tri rabistoj. Ĉu vi povas imagi? Unu el ili estis tiel frapita de mi, ke li mortis, kaj la aliaj estis pro mi senditaj al Siberio por pun-



La artistoj Oleg Popkov kaj Rašid Hajrulin el Len-n-grada E-Teatro plenumas la dramigon „Li frosalis“.

laboro. Eĉ mi mem ne komprenas, de kie venas al mi la forto... Tian fortegulon kiel vi mi povas per unu mano faligi. Jes, fraĵo, dio gardu tiun, kiu kontraŭ mi fiagos. La rabisto ne nur restos sen brakoj kaj kruroj, sed ankaŭ estos juĝata. Ĉiuj juĝistoj kaj distriktaj policistoj estas miaj konatoj. Mi estas homo ŝtata, necesa... Mi veturas ien — kaj la estraro scias... Observas, ke neniu faru al mi malbonon. Survoje, post la arbustoj sidas policistoj. Ate... ate... atendu. Kien vi ekveturis? Kien vi veturigas min?

— Cu vi ne vidas? Estas arbaro!

— Vere, estas arbaro... Kaj mi tiel ektimis! Tamen mi ne devas malkaŝi miajn emociojn. Li jam rimarkis, ke mi timas. Kial li tiom ofte sin turnas al mi? Certe li ion ektencis... Antaŭe li preskaŭ ne veturis kaj nun jen kiel

rapidegas! Aŭskultu, Klim, por kio vi tiel rapidegas la ĉevalon?

— Mi ĝin ne rapidegas. Ĝi mem ekkuris... Kaj se ĝi ekkuris, neniel oni povus ĝin haltigi... Ĝi mem ne ĝojas havi tiajn gambojn.

— Vi mensogas, fraĵo! Klare mensogas! Sed mi al vi ne konsilas tiel rapide veturi. Malrapidigu la ĉevalon. Cu vi aŭdas? Malrapidigu ĝin!

— Por kio?

— Por... por... ĉar de la stacio devas sekvi min kvar kamaradoj. Necesas, ke ili atingu nin... Ili promesis atingi min en tiu ĉi arbaro... Kune nia veturado fariĝos pli gaja... Ili estas homoj fortaj, ŝultrolarĝaj... Ĉiu havas revolveron... Kial do vi senĉese postrigardas kaj turniĝas, kvazaŭ sur pingloj vi sidas? Por kio vi devas rigardadi min? Nenio interesa troviĝas ĉe mi... Eble nur la revolveroj... Se vi volas, bonvolu, mi ilin elpoŝigos, mi ilin montros... Bonvolu...

— Helpon! Helpon! Prenu, malbenito, la ĉevalon kaj la ĉaron, nur ne pereigu min! Helpon! (forkuras).

— Forkuris... ektimis la stultulo... Kion nun fari? Mi mem ne povas daŭrigi la veturon, ĉar mi ne konas la vojon, krom tio oni povus suspekti, ke mi ŝtelis la ĉevalon... Kion fari? Klim! Klim! Klim! Karulo! Kie vi estas, Klimĉjo? Klim, ĉu estas vi, karulo? Ni veturu! Vi mor... mortigos min! Mi ja ŝercis karulo! Punu min dio, mi ŝercis! Kiaj ĉe mi, revolveroj? Mi pro timo mensogis! Estu bonai ni veturu! Mi frostiĝas. Nu, kial vi, mal, saĝulo, ektimis? Mi... mi ŝercis, kaj v-ektimis... Eksidu!

— Estu dio kun vi, sinjoro. Se mi anticipe scius, eĉ por cent rubloj mi ne veturigis vin. Mi preskaŭ mortis pro timo...

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Valora libro pri Bulgario

Kvankam kun certa malfruigo, ni kun plezuro notas la ĝojigan fakton, ke en 1978 en Japanio aperis libro pri Bulgario, verkita de Masumi Hugiimoto, e-istino el u. Kioto. La libro havas la titolon „Trans Danubo“. Ĝi estas rezulto de 50-taga restado de la aŭtorino en nia lando.

Tio estas priskribo de ĉio vidita kaj travivita de s-anino Hugiimoto dum ŝiaj kontaktoj kun la ĉiutageco de civitanoj el diversaj anguloj de nia lando. En la centro troviĝas la familio de Marin Marinov — bulgara e-isto, sekretario de la Distrikta-Urba Estraro de BEA en Sofio. Fakte per lia helpo realiĝis la tuta restado de la aŭtorino en Bulgario. Konsiderindan parton de la libro prezentas la rakonto pri la kontaktoj de s-ino Hugiimoto kun elstaraj bulgaraj e-istoj kiel Kunčo Valev, Violin Oljanov k. a., kun membroj de la Sofia E-societo „Maksim Gorkij“, de la E-societo en Varna, Burgas, Ruse k. a. La aŭtorino partoprenis ankaŭ la 20-tagajn Internaciajn E-kursojn en Burgas (Meden Rudrik), kie ŝi konatigis kun multaj e-istoj el diversaj anguloj de nia lando kaj el eksterlando.

Do, la tuta materialo de la libro estas kolektita pere de E-o. Tial ĝi estas frukto de praktika aplikado de E-o. Aperinte en japana lingvo, la libro allogas informas la civitanojn de tiu fora lando pri Bulgario kaj decida kontribuis al la fondo de turista oficejo „Balkanturist“ en Tokio. Pri la populareco de la libro en Japanio atestas ankaŭ la ambasadoro de Bulgario en tiu lando k-do Todor Dičev.

Rezulte de ĉio ĉi aperis la decido de la televido de Hiroŝimo fari dek dekminutajn filmojn pri Bulgario, kiujn tiu televido prezentos dum du semajnoj en sia rubriko „El la vivo de la popoloj“.

La aŭtoro de la filmo estas s-ro Noriaki Sasaki el la Hiroŝima televido. Antaŭ ol ekveturi al Bulgario li bone trastudis la libron de s-ino Hugiimoto. En unu el la dek filmoj li rakontas ankaŭ pri la vivo de personoj, menciitaj en la libro, do e-istoj.

Ni profunde dankas al s-anino Masumi Hugiimoto pri ŝia bona justa libro pri nia patrolando, pro ŝia amika rilato al nia popolo, pro ŝia ekzempla praktika utiligo de E-o.

LA BLANKA ROZO

Tupl... Tupl — Al miaj oreloj en egalaj intervaloj venas tiu brueto de io mole falanta. Mi ĉirkaŭrigardas. Ah jen! — falas la petaloj de la centfolia palruĝa rozo, kiu jam multajn tagojn bonodoras en akvoglaso sur la eta tablo apud mia lito. Mi fiksas rigardon al la pompe disflorinta rozo kun flava stameno. Mi ĝuas la subtilan aromon. Miaj pensoj, ne konante barojn, traflugas tempon kaj spacon, kaj mi vidas min en la fora infaneco, en mia fora naskiĝurbo...

... En la malgranda korto de mia naskiĝdomo estis floroj printempe, somere kaj aŭtune. Mi ŝatis fosi, akvumi kaj sarki la florbudojn. Ofte mi sidis sur mia tripeja seĝeto kaj ravite observis la diverskolorajn petalojn, flavajn stamenojn kaj verdajn foliojn. Kia granda majstro estas la bona dio! — mi pensis tiam; ĉar panjo ĉiam konsilis al ni esti bonaj kaj honestaj por meriti la favoron de la bona dio, kiu kreis la belajn florojn kaj la tutan mondon. Kvankam infano, mi tamen sekrete demandis min: per kio ni kolerigis la bonan dion, ke ni, ses infanoj, restis orfoj, ke ni ofte malsatas kaj frostas, malgraŭ ke mia povra patrino tagnocte laboras al fremdaj homoj? Kaj kial mia kara frato, nur dekokjara, kuŝas katenita al la lito pro kormalsano, kaj tra la eta fenestro mi vidas nur lian palan vizaĝon kaj la tristajn blujn okulojn, kiuj rigardas min kaj la florojn?...

El inter ĉiuj floroj mi pleje ŝatis la etan rozarbaston, kiun ekde frua printempo ĝis malfrua aŭtuno ornamis bonodoraj centfoliaj rozoj. Ankaŭ mia frato ŝatis ĝin. Mi regule tranĉis la plej belan rozburĝonon kaj metis ĝin en akvoglaso sur la parapeto de lia malalta fenestro. Kiam la petaloj komencis fali, mi metis freŝan rozburĝonon.

En tiu fora jaro la aŭtuno daŭris longe. Sur la arbusto neatendite aperis lasta delikata burĝono. Kiam mi etendis manon por tranĉi ĝin, mia frato frapetis al la fenestreto kaj vokis min per sia pala mano. Mi rapide proksimiĝis. Mallaŭte li ekflustris:

— Ne fortranĉu ĝin, franjo! Kovru la arbuston per iu dika papersako, por ke la prujno ne difektu ĝin. Se ĝi ne frostiĝos, vi donacos ĝin al mi por la Nova Jaro!...

Goja pro lia ideo, mi rapide iris en la remizon, kie mia patro gardis sian masonistan ilaron dum li vivis. Mi enŝovis kelkajn papersakojn unu en la alian kaj atente kovris per la dika ŝirmilo la arbuston kun la lasta rozburĝono sur ĝi. Mia frato aprobe kapsignis el la eta fenestro...

La saman nokton dika prujno difektis ĉiujn lastajn florojn en nia ĝardeno. Gi blanke

briletis sur la flava papersako. Komenciĝis forta frosto. Post nelonge falis abunda neĝo. Mia kovrita rozarbusto similis al neĝa monteto.

La sanstato de mia frato rapide malboniĝis. La vivo en la akvoplana korpo estingiĝadis antaŭ miaj okuloj. Kiam mi direktis al li la kuleron kun siropo, li apenaŭ malfermis sian buŝon. Kaj unu tagon li ne plu malfermis ĝin...

Li kuŝis en malriĉula ĉerko. En la duonfermitaj okuloj speguliĝis la flametoj de la vakskandeloj. Mi sidis sur mia tripeja seĝeto apud mia pro doloro frakasita patrino. Vane ŝi klopodis deflankigi min de tie. Mi fikse rigardis la delikatan, palan, jam trankvilan vizaĝon de mia frato. Odoris je incenso kaj vakso. La najbarinoj venis unu post la alia, laŭte eksplorinte jam de la pordo. Ili tenis enmane bukedetojn de ocimo, pelargonio kaj folioj de geranio, kiujn ili metis sur liajn krucigitajn manojn. Ne estis aliaj floroj en tiu malfrua frosta sezono. Subite ekŝajnis al mi, ke la lipoj de mia frato moviĝas. Mi kvazaŭ aŭdis lin flustri: „Kovru la rozon, franjo! Vi donacos ĝin al mi por la Nova Jaro!...”

Mi rapide eksaltis, prenis la tondilon kaj kuris al la rozarbusto. Foriginte la neĝon, mi atente levis la papersakon. Kaj — ho, miraklo!

Blanka rozol! Pompe disflorinta blanka rozol! Mi eksentis fortan rozodoron. Ravite mi observis tiun miraklon de la naturo. La delikata rozkolora burĝono, senigita de lumo, estis transformiĝinta en ĉarman blankan rozon. La forta aromo rapide forflugis en la frosta aero.

Mi atente fortranĉis la rozon, rapide eniris la ĉambron plenan de plorantaj, nigre vestitaj virinoj, kisis la senvivan frunton de mia frato kaj metis la rozon sur lian koron kun la vortoj: „Jen via lasta rozo, frato mia!” Gi ekbrilis inter la modestaj ruĝaj kaj verdaj floretoj simile al fajna fajenca ornamaĵo. Panjo kaj la aliaj virinoj eksploris pli laŭte. La ĉambron eniris ankaŭ miaj aliaj fratinoj. Mi rigardis iliajn palajn vizaĝojn kaj en mian ribelan animon denove traŝoviĝis protesto kontraŭ dio, kiu lasis nin vivi en malluma, humida ĉambro, igis nin palaj, simile al la senigita je lumo rozburĝono...

Oni forportis la ĉerkon. La blanka rozo akompanis mian palan fraton mortintan nur dekokjara...

La pensoj, traflugintaj senbare tempon kaj spacon, revenis al mi. Miaj larmoplenaj okuloj denove perceptis la disflorintan rozon, kies petaloj daŭre faladis simile al grandaj, tristaj larmoj...

REZOLUCIO DE LA 65-A UK DE ESPERANTO

Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Stokholmo de la 1-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1980, dum la 65-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestis pli ol 1800 partoprenantoj el 51 landoj,

notante, ke la celoj de Unuigintaj Nacioj, laŭ la Artikolo 1 de ĝia Charto, inkluzivas realigon de internacia kunlaborado „por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio“ kaj ke similaj principoj animas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj postajn internaciajn homrajtajn aktojn;

memorigante pri la agado de Unuigintaj Nacioj en la Jardeko de Luktado por Forigo de Ĉiuj Formoj de Rasismo kaj Rasa Diskriminacio, kaj pri la laboro de Universala Esperanto-Asocio en ties kadro, pri skribita en la laborplano pri la Jardeko akceptita de la Asocio en 1974;

memorigante same pri la grava kontribuo de UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj al forigo de ĉiuj formoj de diskriminacio;

atentigante pri la laboro de UN en la kadro de starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo kaj en kreado de amikaj rilatoj inter la popoloj bazitaj sur la respekto al la principo de egalaj rajtoj;

konstatas, ke

1. la problemoj de diskriminacio surbaze de lingvo estas intime ligita al aliaj specoj de diskriminacio kaj ke tiuj specoj de diskriminacio kutime havas siajn lingvajn dimensiojn;

2. tamen ankaŭ diskriminacio surbaze de lingvo estas klare distingebla kiel aparta problemoj, kiu estas ofte konfuzata kun rasa/etna diskriminacio, sed efektive havas siajn unikajn ecojn;

3. okazas lingva diskriminacio, se el du grupoj havantaj malsamajn proprajn lingvojn, la unua devas eni kaj uzi la lingvon de la dua, dum la dua ne lernas la lingvon de la unua;

4. lingve diskriminaciataj povas esti ne nur lingvaj minoritatoj interne de la ŝtatoj, sed en monda kadro ankaŭ sendependaj nacioj kaj ŝtatoj;

5. lingvan diskriminacion praktikas tiu, kiu uzas sian propran lingvon por ĉiuj kontaktoj kun alilingvanoj, tiel devigante ilin uzi tiun lingvon;

6. lingvan diskriminacion suferas tiu, kiu estas devigata de alia popolo uzi ties propran lingvon en difinitaj sferoj de la vivo (ekzemple en edukado, en la profesio, en internaciaj kontaktoj);

7. lingva diskriminacio inter ŝtatoj ofte manifestiĝas en la interna lingva politiko de internaciaj organizoj, kiuj favoras iujn naciajn lingvojn kiel laborlingvojn (kaj sekve favoras iujn ŝtatojn super aliaj), tiel ekskluzivante aliajn lingvojn, ofte la lingvojn de la malpli fortaj popoloj kaj ŝtatoj;

atentigas pri la signifa rolo, kiun povas ludi la Internacia lingvo Esperanto en la forigo de lingva diskriminacio kaj en starigo de kunlaboro inter ŝtatoj kaj popoloj en spirito de egaleco;

atentigas, ke en interna lingva politiko de internaciaj organizoj la utiligo de E-o prezentas nepre praktikan rimedon por forigi diskriminacion surbaze de lingvo kaj por faciligi egalecajn kontaktojn inter la diversaj ŝtatoj-membroj;

alvokas al la diversaj ŝtatoj kaj al internaciaj organizoj, ke ili serioze kaj scienca esploru la atingojn kaj potencialojn de la Internacia Lingvo Esperanto kiel rimedo de la internacia komunikado cele al realigo de la principoj de la Charto de UN, la Universal Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internaciaj aktoj.

Noto: Krome, dum la kongreso en Stokholmo la Komitato de UEA akceptis kvar apartajn rezoluciojn, kiuj temas pri: la lingva problemoj en la internaciaj organizaĵoj, kontraŭvirina diskriminacio, lingva problemoj en la sporto kaj propono pri Esperanto en la Monda konferenco de Turismo (sept. 1980).



KELKAJ INFORMOJ PRI LA JUNULARA E-MOVADO EN GDR

La junulara E-movado en GDR apartenas al la plej malgrandaj en la socialismaj landoj, tamen ĝi estas pli granda ol multaj okcidentaj sekcioj. La gvida organo de la e-istoj en Germana DR — Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR (CLE) — jam de multaj jaroj dediĉas specialan atenton al la junulara laboro. Ĝi fondis Junularan Komisionon (JK), kies historio spegulas la malfacilan sed konsekvencan agadon por plijunigo de la esperantistaro en nia lando.

Bedaŭrinde la junaj homoj ne ĉiam estas kaj restas junaj, ili pliiĝas kaj eliras el la junularo. Kromas iuj faktoj, kiuj estas ĝojigaj por la unuopuloj, sed senpersonigaj por la organizo: geedziĝo, naskoj, fino de lernado, profesilernado kaj studado, servo en la armeo ktp. Ĉion ĉi spertas ankaŭ la e-istoj.

(Daŭrigo sur paĝo 15)

Internacia E-seminario en Phöben (GDR), kiun partoprenis ankaŭ la junaj bulgaraj e-istoj Virjinija Dokova (Vidin) kaj Evgeni Georgiev (Sofio).



Cefa realiganto de la junulara laboro estas la distriktoj. Ili havas la taskon kunigi la junulojn, laborigi ilin en speciala juneca atmosfero, vekii intereson al lingva kaj faka kvalifikoj. Kaj la JK, kiun mi jam aludis? Jes, ankaŭ tiu 17-persona organo havas laborterenon. Unue, ĝi kunlaborigas la junularajn gvidantojn de la distriktoj, igas ilin interŝangi sperton. Due, ĝi realigas la kunlaboron kun eksterlandaj junularaj sekcioj kaj TEJO. Lastatempe ni fieras pri pliboniganta sistemo de informado kaj instruado. JK eldonas „Junularan Cirkuleron“, kiu estas ĉefe germanlingva informilo, destinita ekskluzive por interna uzo. Junuloj, kiuj ĵus aliĝis al la E-movado, ricevas statistikan enketilon kaj tripaĝan leteron, kiu informas pri la E-movado kaj aplikado de la lingvo. Ĉiujare okazas junularaj seminarioj, en kiuj ni sendas 20–30 junulojn por doni al ili bazajn konojn pri E-asocioj, pri sociaj kaj sciencaj aspektoj de la okupigo pri planlingvoj kaj ĉefe E-o, pri la utilo de E-o ekster turismo kaj korespondado. Ĉi tie la gvidantoj de la junulara movado havas rektan kontakton kun la novaj e-istoj, informigas pri utilaj motivoj lerni E-on, pri problemoj en la kursoj ktp.

Michael Lennartz

E-SEMINARIO EN BERLINO

De 15–27 de septembro en Berlino okazis la ĉiujara internacia E-seminario. En ĝi partoprenis ankaŭ du bulgaroj — Dimitro Ivanov el Plovdiv kaj Vanko Bårdarov el Botevgrad.

En la seminario sub la gvido de s-ano E. Tvaroĵek oni profunde traktis kelkajn apartaĵojn el la gramatiko de E-o, analizis tipajn erarojn, faratajn de diversnecianoj.

En la programo de la seminario estis antaŭvidita ankaŭ vizito de Berlino kaj Potsdamo.

En Berlino ni rigardis la kastelojn Köpenik, la muzeojn „Pergamon“, la historian kaj natursciencan, la naciajn artgaleriojn, la palacon „San Susi“ kaj „Cecilienhof“ — la loko, kie estis subskribita la Potsdam-kontrakto. Pri ĉiuj ĉi vidindaĵoj oni anticipe projekciis lumbildojn, kiujn akompanis per bonaj klarigoj k-do Rudolf Halbom — prezidanto de CLE.

Honore al la eksterlandaj seminarianoj okazis oficiala vespermango en la klubejo de Kulturagantoj en Berlino. Al ĉiu gasto oni enmanigis albumon de reproduktaĵoj.

Fine de la seminario estis organizita internacia vespero kun riĉa artprogramo. Sonis kantoj kaj recitaĵoj ankaŭ en bulgara lingvo.

V. Bårdarov



AŬSTRIO. En la novinaŭgurita UN-centro en Vieno d-ro H. Maitzen, laboranta en la Astronomia Observatorio de la Viena Universitato, reprezentas UEA-n.

BELGIO. Flandra E-Ligo, kiu estas reprezentata en 33 lokoj, registris fondiĝon de 14 novaj rondoj en 5 provincoj.

La valona gazeto „Dernière Heure“ aperigas regule monatan rubrikon pri E-o.

En Bruselo eldonistoj el la tuta mondo sukcesigis la ĉi-jaran Libro-Foiron, kie vendiĝis ankaŭ E-lernolibroj kaj vortaroj.

BRITLANDO. La Parlamenta E-Grupo nombras 108 membrojn.

(Daŭrigo sur kovrilpaĝo IV)

«Espero»,
Socio Esperantista
EN S. PETERBURGO,
konfirmita
de S-ro la Ministro
Por Aferoj Internaj
la 24-a Marto 1892.

„Эсперо“
Общество Эсперантистов
в С.-ПЕТЕРБУРГЕ,
утвержденное
Г. Министром
Внутренних Дел
24 Марта 1892.

S. Peterburgo, la 18/XII 1906

Al Si:oro Prezidanto de La Lingva Komitato Profesoro E. Boirac

Tre estimata Sinjoro!

Je Via lasta letero, en kiu Vi antaŭadmonas min, ke se mi „ne respondos al tiu letero, mi prenos sur min forstreki Vian nomon el la nomaro de niaj kolegoj“, mi rapidas doni al Vi kelkajn klarigojn pri mia tia kvazaŭ neakurateco kaj mi esprimas la esperon, ke Vi ne rifuzos raporti ilin al la tre estimataj komitatanoj.

En la Bulonja Kongreso laŭ korespondo de l'gazeto „Lingvo Internacia“ mi estis elektita membro de la Lingva Komitato, pri kio tamen mi estis oficiale nek sciigita, nek demandita, ĉu mi estas libera aŭ ne kaj sekve ĉu estos al mi poveble partopreni en tiu grava laboro? Kompreneble, la unua argumento ne estas grava, ĉar ĉiu esperantisto devas laŭ sia ebleco helpi per kia ajn laboro disvastigadi nian karan ideon, sed la dua — estas tiel gravega, ke mi estas devigita doni plej detalan raporton. Kiel, eble, al Vi estas konate, antaŭ 2 jaroj ĉe ni en Rusujo la vasta kaj organizita propagando de Esperanto preskaŭ ne ekzistis, nur izolitaj esperantistoj laboradis kaj laboradis senlace, detruante iom post iom la renkontitajn de ili barojn. En la komenco de 1904 jaro mi, loĝanta en la centro de la spirita vivo de Rusujo, en Peterburgo, iel eksciis pri Esperanto kaj pri ĝia celo. Ekflamiĝinte por la noblaj ideoj de nia majstro D-ro Zamenhof, mi fariĝis adepto de la esperantismo kaj post unu monato sekretario de S-to „Espero“. De tiu ĉi momento mi ne scias, kion devas signifi la vortoj „libera tempo!“ La tutan tagon la vizitado de malsanuloj, la tutajn vesperojn laborado por S-to „Espero“. Sed kio estas laborado ĉe ni en Rusujo? Vi, liberaj regnantoj, ne povas eĉ imagi al Vi. Vi senlace propagandas kaj konvinkadas Viajn aŭskultantojn, sed ni, mizeraj ruslandaj sklavoj, oficiale nomitaj regatoj, devas bataladi kaj bataladi ĝis morto kun nia malestiminda registaro, kies devizo estas nur sufokadi kaj mortigadi eĉ ĉian viveman penson. Kompreneble, el tiuj kelkaj vortoj mia rilato al nia registaro estas al Vi tute klara! Kiel patrujano mi ne povis foriri flanken de la politika vivo kaj ĝia agado, mi partoprenas kaj partoprenos ĝis ĝi, nia registaro, tiu ĉi putriginta absceso ne krevos kaj per sia morto fine ne liberigos la malsatan, malriĉan popolon! Nur tiam, kiam eklumiĝos ĉe ni la libereco, kiam ni nin sentos liberaj, tiam ankaŭ mi povos partopreni en Via tre estiminda Komitato. Mi finis kaj nun de Vi dependas elstreki min el Via nomaro, sed mi humile petas Vin, en ĉiu okazo ne rifuzi sendi al nia redakcio Viajn cirkulerojn.

Via humila servanto D-RO ASNES
Transskribis Adolf Holzhaus 1976

EPOKFARA VERKO

1000 a DATREVENO DE LA NASKIĜO DE AVICENO

Abu-Ĥali Ĥusajn ibn-Ĥdallah ibn-Ĥasan ibn-Ĥali ibn-Sina al-Buĥari, nomita Aviceno, estas unu el la plej eminentaj kreintoj en la historio de la scienco kaj filozofia penso. Li vivas kaj kreas en diversaj regionoj de Meza Azio kaj Irano, kiuj efektivigas sian kulturan-historian mision sur la vojkruciĝo inter la orientaj reglandoj kaj la okcidentaj ŝtatoj. Dum la IX-XI jc. sur ilia teritorio formiĝas kelkaj ekonomiaj kaj kulturaj centroj, en kiuj estiĝas la politika potenco de regantoj vasalaj al la Bagdada Kaliflando.

Naskita en 980 en Afšana, Aviceno elkreskas en la ĉefurbo de la Samanida ŝtato Buĥaro, kie li akiras bonajn klerigon kaj edukon. Posedante eksterordinarajn intelektajn talentojn kaj laboremon, ibn-Sina kontentigas siajn teoriajn interesojn en diversaj agadkampoj de la scienco, la filozofio, la muziko kaj la poezio. Malĝoja estas lia sorto de pensulo, kreinta sian memstaran civitanan pozicion. Li estas devigita ofte plifortigi sian naturan senton de memkonservo per la prudento de la saĝeco. Ne farante principajn cedeojn, la filozofo lerte akomodigas al la konstanta kontraŭbatalo de la despotismo kaj la scio, de la perforto kaj la saĝeco, de la devo senkulpigi (kaj preskribi) kaj la libereco verki. Jen favorata precipe pro la egoismaj interesoj de la regantoj, jen persekutata pro sia liberpensado, li laboras en diversaj urboj — Buĥara, Niŝapur, Rej, Ĥamadan, Isfahan k. a. Penetranta de la demokratismo de la scienco kaj literaturo, Aviceno verkas en la kortegoj de ambiciaj regantoj, kie li estas konsilisto, kuracisto ĉe la kortego aŭ veziro. Ne malofte objekto de intrigoj kaj perfido de korteganoj, en mallibereco aŭ en „la ombro“ de la kuratoreco de siaj protektantoj, li ne cedas al peniga povomanko kaj al plena malespero. Tio, kio altnurte donas sencon al lia vivo, estas la pasia kaj sistema sinokupo pri la problemoj de la scienco.

La verkaro de Aviceno estas bonega modelo de

SINTEZO DE SINCERA ENTUZIASMO KAJ SISTEMA PENSADO.

de libereco de la sentoj de poeto kaj la disciplino de la severa racio de filozofo. Io de la antikva genio estas veninta en la menson de la mezepoka pensulo — kortuŝa humileco ankaŭ la „altaro de la kono“, sincera kredo je la justeco kaj la universaleco de la spirito.

Metafiziko (ontologio) kaj gnosologio, logiko kaj etiko, medicino kaj psikologio, poezio kaj sociologio — jen kelkaj el la agadkampoj de la scienco kaj la arta verkado, al kiuj estas dediĉitaj la multnombraj (ĝis hodiaŭ ankoraŭ precize ne determinitaj) verkoj de la granda mezepoka pensulo. Ilia enhavo rivelas la fruktodonajn penadojn de enciklopedia menso solvi la plej komplikajn demandojn de la scienco kono.

En la verkaro de Aviceno estas sentata la spiro de la tempo, plenigita de ŝtormaj eventoj, kiuj elmetas al gravaj elprovoj la sorton de multaj popoloj. Vere, la teologiismo imperativo altrudas siajn dogmojn kiel fundamentajn postulojn en la tuta vivo de la socio. Kiel sintezo de la superstrukturo de la feŭda socio en Meza Azio, Irano kaj Proksima Oriento la islamo ne estas nur religio, sed parte filozofio kaj etiko, literaturo kaj arto, ĉe politika doktrino. La unua „spirita breĉo“ komenciĝas ekde la provo „malkomponi“ tiun ĉi sintezon per renasko kaj evoluiĝo de la progresema teoria heredaĵo de la antikvaj popoloj. La scienco-kultura fero de ibn-Sina estas unu el la ĉefaj faktoroj tiudirekte. La „interna opozicio“ al la dogmoj de la religio, efektivigita ofte formale kaj per la armilaro de la teologiismo — tio ĉi estas la ĉefemo en la tuta agado de la pensulo.

Komentante pli ĝuste ol multaj mezepokaj pensuloj la filozofion de Aristotelo, Aviceno prilaboris apartajn ĝiajn materismajn kaj raciismajn ideojn. Li motivigas la kosmogonian tezon pri la eterneco de la mondo kaj per tio objektive kontraŭstaras la religiajn dogmojn. La realisma metodo de Aviceno kiel filozofo substrekas la rolon de la objektiva analizo, akceptas la naturajn leĝojn kaj logike kondukas al relative sciencaj difinoj de la kardinalaj problemoj de la filozofio — pri movado, tempo kaj spaco, pri kaŭzo kaj logikonformeco k. a.

Dum la tempo, kiam ekzistas ĝenerala adorado de la dogmo de mahometismo kaj regas despotismo, kreantaj obeemajn kaj blindajn adeptojn de la religio kaj la leĝo, la filozofia kritikismo de la aristotelismo teorie preparas ideologian opozicion kontraŭ la politika sistemo de la feŭda socio. Per sia agado Aviceno stimulas la kritikismon de la progresemaj tendencoj.

Unu el la plej karakterizaj

trajtoj de la sciencia verkaro de Aviceno estas ĝia raciismo. Aviceno apelacias al sobra esplorado de la faktoj kaj al raciisma sencigo de la realaĵo. Li montriĝas unu el la plej elstaraj kaj konsekvencaj esprimantoj de la filozofia raciismo en la mezepoka teoria penso. Post Rudaki¹ kaj simile al sia granda samtempulo Firdousi² Aviceno donas vivon al la maksimumo, ke la racio estas „okulo de la animo“, sen kiu mallumiĝas la ĝojo de la homoj, gvidanta stelo en la surtera mallumo kaj fonto de homaj virtoj. Fundamenta postulo por li estas, ke ĉiuj faktoj akiras signifon por la kono pere de la leĝoj de la racio. La vero havas super li sanktan potencon. Ne vane en sia sistemo de la sciencoj ibn-Sina destinas al la filozofio la lokon de scienco memstara kaj aparte ekzistanta disde la teologio kaj la islama religia juro (ŝariat). Per tio konturiĝas unu

NOVA KAJ PROGRESOMA KULTURO EN LA MEZEPOKA KULTURO.

kiu poste necese venigas al la fundamenta reformado de la spirita vivo kaj finfine ankaŭ al la emancipado de la filozofio mem.

Unika estas la kontribuo de Aviceno en la mezepoka scienco. La prilaboro de ĝiaj problemoj estas nesatigebla pasio kaj objekto de neelĉerpebla krea energio kaj aŭdaco de la granda pensulo. Rajte en la Oriento li estas nomita „instruisto de la scienculoj“. Kontraŭe al la alĥemiistoj kaj astrologoj, kiuj atendas „la donacon de la revelacio“, ibn-Sina strebas klari la naturon, elirante el ĝiaj fenomenoj kaj leĝoj. Per kelkaj siaj hipotezoj li estas unu el la malproksimaj mezepokaj antaŭuloj de la helaj intelektuloj de la Renesanco en Eŭropo.

Nesuperitaj por tiu epoko estas la atingoj de Aviceno en la sfero de la medicino. Li havis la kutimon diri, ke dum la filozofio estas lia destino, la medicino estas lia profesio. Lia nomo povas stari kune kun tiuj de la antikvaj medicinistoj Hipokrato kaj Galeno. Li prilaboras fundamentajn demandojn de la medicino, donante, kiel li mem emfazas en sia aŭtobiografio, aparte grandan signifon al la provo kaj la eksperimento. Aviceno dediĉas al la medicino ĉ. 20 sciencajn verkojn. El ili sendube elstaras la fama „Medicina kanono“ — vera enciklopedio de la medicinaj sciencoj kaj praktiko. En ĝiaj kvin partoj

LENIN-MONTETOJ

Du knabetoj kuris sur la vasta herbejo post bunta ridetanta flugdrako, kiun la apenaŭ sentebela ventetolevis kaj flugigis. Estuziasmitaj, ili ne rimarkis la viron, kiu observis ilin. Li estis vestita en malhela kostumo, surkape kun kaskedo. La poleksioj de liaj manoj estis ŝovitaj en la veston. Liaj penetrantaj okuloj, mallonga barbo kaj lipharoj — ĉio ĉe li ridetis.

Proksimiĝinte al la infanoj, la viro diris: — Bonan tagon, junaj amikoj! Hodiaŭ la vetero estas bonega, ĉu ne? Nur por ludol! La infanoj haltis ĉe li kaj demandis:

— Kaj vi, onklo... kion vi faras ĉi tie?
— Mi venis por iomete promeni kaj ripozi, sed... la pensoj ne forlasas min.

La lastajn vortojn li diris kvazaŭ al si mem. Lia vizaĝo estiĝis serioza.

— Pri kio vi pensas, onklo?

La rigardo de la viro direktiĝis al la blanka urbego, kiu etendiĝis sube, haltis sur la orkupolon de unu el la multnombraj preĝejoj kaj poste sagraĵe flugis super la senlima ebenaĵo. Ĝi atingis la fajrosprantajn militfrontojn. Tie la fidelaj filoj de la laborpopolo batalis je vivo kaj morto por la patrujo, por la libero, por la justeco.

Sed la viro diris nenion pri tio.

Karesinte la blondajn kapetojn de la infanoj li demandis pri iliaj nomoj. La infanoj nomiĝis Serjoĵa kaj Vanjuŝa.

— Serjoĵa... Kio vi deziras estiĝi, kiam vi kreskos granda?

— Mia patro estas masonisto. Sed li konstruas ne grandajn domojn. Mi deziras konstrui grandegajn domojn.

— Bonege. Vi fariĝos arkitekto por konstrui grandegajn domojn. Sed unue vi devas diligente lerni. La sovetaj ŝtato vivtenos vin por tio. Kaj ĉi tie, Serjoĵa, sur tiu ĉi monteto vi konstruos grandan palacon kun multaj haloj kaj ĉambroj. En tiu palaco ne loĝos reĝo kaj korteganoj. En ĝi lernos la gefiloj de la laborpopolo. Post la fino de la studado ili fariĝos instruistoj, kuracistoj, agronomoj kaj arkitektoj kiel vi, Serjoĵa.

— Kaj ankaŭ aviadistoj, ĉu ne? — malpacience diris Vanjuŝa, iom ofendite, ke por momento oni forgesis lin. Li estis lasinta flugi la kajton kaj ĝi leviĝis al la hela ĉielo.

— Aviadisto! — ripetis la nekonato. — Tio ankaŭ estas bona profesio.

Kaj li rakontis, kiel en la estonteco grandaj aviadiloj por tute mallonga tempo traflugos la senfinan Ruslandon. Kaj eble jam en tiu ĉi jarcento la homoj atingos la lunon kaj aliajn astrojn per raketoj. Ĉio ĉi ne estas elpensado, sed vero, dirita de la maljuna rusa sciencisto Konstantin Ciolkovski.

— Memoru tiun ĉi nomon! — findiris la viro.

— Kaj vi, onklo... Kiu estas via nomo? — demandis Vanjuŝa. — Ja vi parolas tiel bone!

La rigardo de la nekonato denove direktiĝis malproksimen...

— Kiam mi estis knabo kiel vi, oni nomis min Volodĵa...

En unu momento nesuperebla deziro kaptis lin denove estiĝi la iama petolulo Volodĵa, ekkuri kun tiuj ĉi Vanjuŝa kaj Serjoĵa post la flugdrako, revii pri tute nova vivo...

— Infanoj... karaj infanoj! — Li protekte metis la manojn sur iliajn ŝultrojn kaj ĝemspiris. — Nun ĉiuj nomas min Lenin.

Lenin?! Feliĉaj konatigi persone kun la granda homo, staranta ĉe la direktilo de la ŝtato, la infanoj jubilis. En tiu tempo ili tute ne komprenis, kiel malfacile estas esti Lenin.

De tiu ĉi suna tago pasis multaj jaroj. Vanjuŝa estiĝis aviadisto. Li pereis kiel heroo en aerbatalo kontraŭ la germanaj invadintoj. Serjoĵa atingis Berlinon kaj revenis hejmen kun multaj ordenoj surbruste. Li efektivigis sian revon konstrui grandajn domojn. Eĉ partoprenis la konstruadon de la Universitato sur la sama loko, kie li kiel infano konatigis kun Lenin.

Kaj la montetojn, sur kiuj la granda homo ŝatis promenadi, oni nomas „Leninskie Gori“ — Lenin-montetoj.

estas traktataj la demandoj de la anatomio kaj la ĝenerala terapio, de la malsanoj kaj la kuraciloj. Ĝi estas multfoje reeldonita kaj preskaŭ ĝis la komenco de la XVIII jc. estas gvidlibro de la kuracistoj.

En la periodo de akraj sociaj konfliktoj Aviceno manifestas

ENVIINDAN KURAĜON DE HUMANISTO

Rilata kritike al la socia strukturo de la socio kaj al la dominantaj politikaj regimadoj, li apelacias al kultivado de justeco, prudento kaj aliaj formoj de „praktika saĝo“ en la sociaj rilatoj.

Li estas konvinkita pri la eblo ŝanĝi kaj perfektigi la „socian organismon“ kaj estiĝi tian ŝtatan ordon, kiu eliminus la maljuston kaj la perforton, respektus kaj kreus kondiĉojn por evoluigo de la nobla kaj virtaj principoj de la homa naturo, por evoluigo de la scienco kaj disvastigo de la klerigo.

La afero de Aviceno estas unu el la plej grandiozaj atingoj de la Mezepoko. Kaj kiel ĉiu granda afero ĝi antaŭas sian tempon kaj per kelkaj siaj faktoj kontraŭstaras kaj oponas ĝin. Ĝia multflanka influo estas historie pruvita kaj senduba. Ĝi estas antaŭanto de

tiu kultura-kleriga kaj humanisma movado, kiu ne nur revivigas la progresemajn ideojn de la antikva mondo kaj la frua Mezepoko, sed ilin evoluigas kaj konfirmas kiel universalajn principojn de la monda civilizacio.

El la bulgara: Dimitro Ĥagiev

¹ Rudaki, Abduabdulo (ĉ.860—941) — irana poeto.

² Firdousi (ĉ.940—1020) — irana poeto, fama per sia epika poemo „Ŝahnama, la Libro de la Reĝoj“ — en kiu la poeto rakontas la historion de Persujo en 60000 versoj.

La kompleta radio-kased-kurso „Jen Nia Mondo“, kiun Grupo Kvin prilaboris dum pluraj jaroj, estas nun eldonita. Por laŭti la kurson d-ro J. C. Wells, la kursgvidanto, demonstris ĝin en la brita parlamentejo ĉe kunveno de la Parla. neta Grupo, kaj la Grupo Kvin donacis ekzempleron al la parlamenta biblioteko „Library of Commons“.

Sekve de la rezolucio pri E-o de la Monda Federacio de Asocioj pri UN la brita E-Asocio sisteme distribuas informilon pri E-o al la filioj de la Asocio pri UN en Britio.

CINIO. En majo ĉi-jare la Beijing-a Lingva Instituto ekfunkciigis la duan E-kurson kun 57 studentoj de la fremdlingva fakultato.

Ĉkazis televidelsendo el Tianjin pri la agado de Armand Su kiel E-poeto.

Je la 30 de marto fondiĝis la Chongqing-a E-Asocio.

De 23.5—2.6. en Beijing okazis E-ekspozicio, vizitita de pli ol 14 000 personoj.

30 interpretistoj kaj gvidistoj sekvis E-kursojn organizitajn de Ĉina Internacia Vojaĝa Servo en Beijing.

En nova ĉina bulteno pri entomologia taksonomio, nomata „Entomotaksonomia“, resumo de la artikoloj estas faritaj en pluraj lingvoj, inter kiuj E-o.

FR GERMANIO. En pluraj germanaj urboj s-ino Elisabeth Bormann gvidis ĉe virinaj kluboj debatojn pri la Internacia Lingvo.

Fondiĝis nova E-eldonejo „Esperanto-eldonejo Palatina“, Ciggebach, Schlossgasse 30, D-6731.

FRANCIO. Studentoj en Lille fondis E-rondon. Adreso: Yvon Henel, 34 rue Lydrée, F-59800, Lille. La universitato Lille III, fako „Konstanta Klerigado“, proponas inter aliaj temoj E-kursojn. En Aix-en-Provence funkciis en la pasinta lernejo E-kursoj en la Universitato kaj en du kolegioj.

HISPANIO. La 6. 5. 1980 sur la piej grava radioĉeno en tre populara ĉiutaga programo „Noktomezo“ oni traktis dum unu horo la temon „Esperanto“.

En printempo ĉi-jare ĉiuj radio- kaj televid-stacioj de la Orlanda Regiono (Florida) dissendis informojn kaj ĉe paroladojn pri la Internacia Lingvo.

Ekde la 18. 5. 1980 sur placo en grava kvartalo de Sabadell aperis tabulo kun la nomo de la multjara tre aktiva e-isto Jaume Viladoms Vals, iama UEA-delegito, pioniro de E-o kaj senlaca kursgvidanto.

HUNGARIO. La ĉi-jaran Junularan Renkontiĝon en u. Tata (2—4 de majo) partoprenis pli ol 600 gejunuloj el diversaj landoj.

Sur verda memorŝtono troviĝas E-stelo, sub ĝi

surskriboj en E-o kaj en hungara lingvo: „Memore al JER-80 starigis la e-istoj de urbo Tata, la 4an de majo 1980.“

POLLANDIO. En la laste aperinta „Nala encyklopedia medycyny“ (Malgranda enciklopedio de medicino), eldonita de la Stata Scienca Eldonejo en 100 000 ekzempleroj, troviĝas la unua biciklo de d-ro L. L. Zamenhof kun portreto.

Pli ol 160 E-artikoloj jam aperis en la pola ĵurnalo „Dziennik Wiczorowy“.

SLOVAKIO. En la lernolibro de slovaka lingvo por la 5a jaro de la bazaj lernejoj, sur la paĝoj 24—26 estas ĉapitro „Daru, caru, caricu“, dediĉita al E-o. Ĉi tiu E-o estas n. e. c. i. a. t. a kaj uzata en ekzercoj ankau sur la p. 11—12.

SOVETUNIO. En Tallinn okazis la fonda konferenco de Estona Filio de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj. La estraron prezidis la estona klerig-ministro, E-veterano el la 1930-aj jaroj, Ferdinand Eisen. Li jam sciigis, ke aperos lernolibro por memlernantoj kaj por lernejoj, vortaro Esperanta-estona, oni daŭrigos la eldonadon de estonaj verkoj en E-traduko, kaj okazos kursoj por instruistoj. Kunlaboros la ŝtataj kaj sociaj organizoj.

En la ĉefa prelegejo de Taŝkent (Uzbekistano) de 9.1—28.5. 1980 aŭtice monate okazis publikaj prelegoj pri E-o. Prelegis docentoj R. M. Vajtraub, K. S. Koblov kaj E. S. Perevertajlo. Krome en diversaj entreprenoj de la urbo oni organizis varbprelegojn pri interlingvistiko kaj E-o; sekve organizigis E-rondoj. En la Domo de Sciencistoj 70 personoj sekvis E-kurson.

En la nuna jaro du popularaj gazetoj en Ukrainio aperigas lecionojn de E-o: „Nauka i suspilstvo“ (Scienco kaj socio, 70 000 ekz.) kaj „Junularo de Ukrainio“ (unu miliono da ekz.). Al la redakcio de tiu lasta tri mil personoj resendas la kontrol-ekzercojn.

SVEDLANDIO. La sveda poŝtadministracio dediĉis al E-o unu paĝon en la speciala broŝuro „Skaffa dig en brevvärn“ (Havigu literamikon), Ĥa turnas sin al junaj homoj kaj estas havebla en ĉiuj poŝtoŝteloj.

SVISLANDIO. La nova prezidanto de SES, elektita en Basel la 4.5.1980, estas d-ro Arthur Baur. Li verkis multe en kaj pri E-o kaj depost 1917 produktas ĉiusemajne unu elsendon en la E-programo sur mallongaj ondoj de Svisa Radio Internacia. D-ro Baur nun estas 65-jara kaj povas en ĉi tiu jaro soleni la kvindekajn datrevenon de sia esperantistigo.

Shaux-de-Fonds Gastejo „Edmond Privat“ akiris trian domon, kiu ricevos la nomon „Hektor Hodler“ dum inaŭgura festo okazonta la 13an de decembro.

Horizontale: 2. prefikso. 4. Fadeno envolvajo de pupo. 5. Instruebla alegorio en formo de rakonto. 7. Kantebla lirika poemo. 9. Sovaga eŭropa bovo. 12. Kelkaj presitaj kajeroj, kune binditaj. 13. Malgranda venena serpento. 14. Pronomo. 16. Akvoŝvelo. 17. Rivero en Afriko. 20. Tropika manĝebla frukto. 21. plej malalta vira voĉo.

Vertikale: 1. Trinkaĵo. 2. Vivmaniero de iu popolo. 3. Rondforma elstara parto de iu organo. 5. Kontrakto pri asekuro. 6. Grimpanta vegetaĵo, uzata por aromigi la bieron. 7. Nutraĵo. 8. Meti en posedo de iu. 10. Antikva skandinava skribsigno. 11. Regula arango de aferoj. 15. Cambio de parlamento. 18. Centra parto de rado. 19. Aersimila materio.

Rimarko. Ĉe vortoj horizontale 4, 5, 12, 13, 16, 17, 20, 21, vertikale 2, 3, 5, 6, 8, 10, 11, 15, 18, 19 la finaĵo estas forlasita.

Adolf Kolzhaus

Solvo de la enigmo en n-ro 6

En ambaŭ direktoj:

A — kamarado. B — aperigo. C — metodo.
Ĉ — aromo. D — rido. E — aĝo. F — do. G — o.

